

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 569 (4)

APRILo 1953



(foto : *Vjesnik*)

Furiozas la danco (*vidu paĝon 119*)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB
Palais Wilson, Genève, Svislando

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono (1953) : 15 ŝil. anglaj (kun
membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅓ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj
Eldonnumero 6000



Enhavo

Specialaj artikoloj :	paĝo
Dulingvismo : <i>Hans Jakob</i>	113
En Eŭropo, Ameriko, en Azio kaj Afriko : <i>I.G.B.</i> ..	116
La elementoj kiuj karakterizas bonan Esperanto-stilon : <i>Lamond</i>	136
Ĉeĥo en Islando : <i>Ota Ginz</i>	137
Poezio :	
Disciplino : <i>Herbert (Dinwoodie)</i>	134
La Duobla Vizio : <i>Lewis (Auld)</i>	134
Penetri tiun ĉambron : <i>Lehmann (Auld)</i>	135
Mi amas vin sen lim' : <i>Heine (Laurat)</i>	135
La papilio : <i>Bernhard Zenker</i>	135
38a Universala Kongreso :	
Oficiala Komunikado n-ro 5	118
Jugoslavujo : <i>D-ro Ivo Borovečki</i>	119
Oratora Konkurso, Oslo 1952	131
Oratora Konkurso, Zagreb 1953	133
Konstantaj rubrikoj :	
Centro de Esploro kaj Dokumentado	135
Enigma Konkurso	142
Esperantista Vivo	117
Internacia Konkurso	117
Nia Forumo	128
Oficiala Informilo	143
Por via distro	122
Radio kaj Esperanto	141
Tra la Libraro	123
Tra la Mondo Esperantista	114
Vivo Virina	140

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 569 (4)

Aprilo 1953



Dulingvismo

*nova formulo por lingva
imperialismo*

LEVIGAS la profetoj predikantaj perfektan solvon de la interlingva problemo. Franca Akademiano (nomon ni ne citu pro indulgo !) verkis artikolon en franca periodaĵo *Carrefour*, kun la altira titolo

**PLIBONE DIREKTTAN DULINGVISMON
OL UNIVERSALA LINGVO FABRIKITA
SEKVE NUR ELEMENTA**

Membro de la Franca Akademio de Sciencoj, laŭ kredo de simpla civitano devus apliki sciencan metodon, la absolutan objektivecon kaj senpartiecon. Citita artikolo estas la malo de tiu ĉi postulo. Por la verkinto la tuta penado pri solvo de tiu ĉi arda problemo, sur bazo sinteza, estas senvalora. Konklude li proponas, eĉ insistas je tio, ke la Unuigitaj Nacioj proklamu kiel solvon la dulingvecon, t.e. apud la propra lingvo, duan nacian. Je la fino de la artikolo la verkinto skribis :

“Mi bedaŭras, ke mi neniam havis la tempon, perfektigi mian scion de la angla lingvo por scii iom pli multe ol elturniĝi en la strato, en trajno, en restoracio. Sprita interparolanto londona kun kiu mi provis interŝanĝon de ideoj kaj kiu ne posedas pli bone mian lingvon ol mi la lian, haltigis saĝe la konversacion : ‘Ni diris ĉion kion ni povis, ni ne povos iri pli malproksimen’.”

Kaj la verkinto konkludas :

Estas same kun ĉia fabrikita lingvo kiu estus nur elementa per kiu oni ne povas iri pli malproksimen ĝis la punkto, kie precize la plej grava estus, kompreni la plej malfacilan.

* * *

Legantoj, tion skribis Akademiano ! En sama artikolo li defendas la dulingvecon kiel principon akceptotan, tamen ne dirante kiun (nacian) lingvon oni devus lerni ĉie, konfesante poste ke li mem ne sukcesis gvidi interparolon en la angla (de li supozata dua) kaj emfaze deklarante, ke Esperanto spite ĝian anaron, ne plu havas praktikan valoron.

Tiu artikolo skribita antaŭ duon-jarcento estus ankoraŭ klarigebla. Post tiom da spertoj facile konstateblaj kaj parte rekonitaj de la verkinto de tiu artikolo mem, la povo sin esprimi elegante en fremda idiomu, estas kvazaŭ privilegio de ne tre multaj homoj. La du- kaj plurlingveco estas limigita.

“Kial igi ion simpla, se oni povas tiom facile komplikigi ĝin ?” oni emus

fino sur paĝo 121



Tra la Mondo Esperantista



La Salvadora Esperanto-Asocio, fondita en januaro, 1953

Danlando

La kutimaj Internaciaj FERIAJ Kursoj, sub aŭspicio de UEA, okazos en Helsingør 18-25 julio 1953. Estos daŭriga kurso, konversacia kurso, prepara kurso por Cseh-metodaj instruistoj, kaj kredeble ankaŭ infan-kurso. Detala prospekto havebla ĉe S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj.

La aŭtunaj FERIAJ Kursoj okazos 18-25 oktobro en la Sporta Altlernejo de Vejle. Prospekto havebla ĉe S-ro Friis post la mezo de aŭgusto.

Salvadoro

La vojaĝema komitatano de UEA, Lic-to Tibor Sekelj, post pli ol

unu-jara agado en Gvatemalo, restis dum la lastaj du monatoj en Salvadoro. Tie li faris prelegojn en diversaj lokoj, kaj publikigis plurajn informajn artikolojn en la gazetaro. Sekvis du kursoj en la Universitato kun 70 lernantoj, kiuj organizis la Esperanto-Asocion de Salvadoro. La nova asocio havas 40 membrojn. Ĝia prezidanto estas prof. Miguel Angel Cobos kaj la sekretario s-ro José Urquilla B. La unua ĝenerala kunveno elektis s-ron Tibor Sekelj honora prezidanto de la Asocio, kaj organizis al li adiaŭan vesperon la 14-an de februaro, ĉar li daŭrigas sian vojaĝon al Honduraso. La kursojn gvidos f-ino Cruz Palma kaj M. A. Cobos.

Slovenujo

Postkongreso : La 17 feb. okazis en Ljubljana konferenco kiun partoprenis pli ol 20 instancoj kaj organizaĵoj de la urbo. La celo estis, sciigi la detalojn de la postkongreso kaj de la 38-a en Zagreb. Prezidis D-ro Maruzzi, pioniro de la movado en Jugoslavujo, kaj parolis S-ro P. Zlatnar, prezidanto de Slovenia Ligo Esperantista, kaj la K.K.S. La kunvenintaj delegitoj promesis ĉian kunlaboron.

En intervjuo kun la urbestro de Ljubljana S-ro Stuttard esprimis dankon pro la praktika helpo por Esperanto flanke de la urba instanco. En unuhora kunsido la K.K.S., S-ro Zlatnar, kaj la urbestro ellaboris detalojn de programo por la regalo de la Esperantistoj post la 38-a.

Dekminuta parolado en la radio informis pri la vizito de la K.K.S. kaj pri la preparaj laboroj en Zagreb, kiel ankaŭ pri la postkongreso en Ljubljana.

Gravaj verkoj en Esperanto : Dum sia restado en Ljubljana, S-ro Mason Stuttard kun S-ro Petar Zlatnar vizitis la kulturministron kaj diskutis detalojn de grava eldonaĵo—*Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj*— kiu aperos antaŭ la U.K. La koncerna ministro asignis 500.000 dinarojn kiel subvencion kaj montris grandan simpatian kaj intereson por Esperanto entute. S-ro Zlatnar poste vizitis Beograd kaj sukcesis akiri plian sumon de 800.000 dinaroj por tiu verko de la koncerna kultura instanco. Krome li aranĝis pri eldono en Esperanto de *Biografio de Tito* (jam aperinta en pluraj lingvoj) je la kosto de la ŝtato! La aŭtoro, Vladimir Dedijer, rezignis pri ĉiuj honorarioj kaj asignis ilin al la Eldonkooperativo de Slovenaj Esperantistoj.

K.E.L.I. konferenco en 1953

Post la Universala Kongreso en Zagreb la KELI-anaro konferencos en Svislando 4-10 de aŭgusto. La renkontiĝo okazos en Rüdlingen, urbeto inter Eglisau kaj Andelfingen en la bela norda regiono proksime de Schaffhausen.

La aranĝoj estas en la manoj de Svisaj KELI-anoj kaj por informo oni sin turnu al S-ro F. Liechti, Wallisellenstr. 429, Zürich 50, Svislando.

Studenta vivo

Pasintsomere okazis en Schluchsee, Germanujo, la unua internacia konferenco por esperantistaj studentoj kaj altlernejoj. Ĝi sukcesis, kaj la nova organizaĵo Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj (IFESA) invitas al simila konferenco, kiu okazos en Ljubljana, la ĉefurbo de Slovenujo, 1-8 aŭg. 1953.

Temoj pritraktotaj estas: studmanieroj kaj studeblecoj ĉe diverslandaj universitatoj, kolegioj kaj altlernejoj; kio estas farata por ke la studado ĉe universitatoj k.s. ne fariĝu tro faka?; studeblecoj por eksterlandaj studentoj en la diversaj landoj; la funkciado de esperantaj katedroj dum 1952/3, k.t.p.

Partopreno kostas 12 us. dolarojn aŭ egalvaloron, kaj interesatoj povas peti senpagan programon ĉe IFESA, Laksegade 35, København K., Danlando.

SYNNØVE SOLBAKKEN

Bjørnstjerne Bjørnson

Plaĉa Norvega rakonto tradukita de
Edith kaj Aŭgust Weide

2ŝ. 3p. aŭ 7 rpk. afrankite

Mendu ĉe U.E.A.

En Europo, Ameriko, en Azio kaj Afriko

“Simile al forsona pralegendo” reaperas en mia spirito la profetaĵo de Dombrovski, legita en mia fora knabaĝo :

“ . . . En Eŭropo, Ameriko,
En Azio kaj Afriko,
Kie ajn vi veturados,
Esperanton vi trovados . . . ”

En la Internacia Konkurso de U.E.A. por 1952 la kvar unuajn lokojn okupis Ameriko, Azio, Afriko kaj Eŭropo, t.e. Brazilo, Izraelo, Maroko kaj Norvegujo.

La deziro venki la konkurson vekis en la brazilaj esperantistoj la sportecan spiriton tra la tuta lando, ĉar la venko estus tre malfacila : ni estis gajnintaj la konkurson en 1951 kaj komencis 1952 kun tre alta kvoto, efektive la plej alta el ĉiuj ekster-eŭropaj landoj. Sekve, nia venko postulus multe da laboro ; sed pro la malfacilo mem ĝi estus despli granda honoro kaj instigis la agemon de niaj sportemaj samideanoj, kiuj ambiciis la venkon de la konkurso en du sinsekvaj jaroj.

Se mia karmemora amiko E. Lanti ankoraŭ vivus, li certe grumblus pro tiu “nacieca” vetbatalemo ; sed tamen ĝi estis granda bono en Brazilo, kie multaj esperantistoj ne estas ankoraŭ organizitaj kaj ŝajne ne atentis la disperdadon de energio ĉe neorganizita laboro.

La sportemaj samideanoj, kun la simpla celo venki la konkurson, dum du jaroj vokis la esperantistojn al aliĝo al nia tutlanda organizaĵo kaj al U.E.A., kaj ili duoble venkis : kaj la konkurson kaj la senorganizaĵon. Se la unua ne gravas, la dua tre gravas, ĉar B.E.L. pligrandigis sian membraron kaj de nun povos multe

pli fari en la propagando ol en antaŭaj jaroj. Preterpase mi menciui, ke la subvencio al B.E.L. estas nun pligrandigita de la Brazila Registaro : ĝi jam ne estas nur morala apogo, sed ankaŭ ekonomia helpo al nia movado.

La rezultato de la konkurso havas altan moralan valoron en nia propagando, ĉar ĝi reliefigas la universalecon de nia movado. Mi jam menciis Amerikon, Azion, Afrikon kaj Eŭropon, sed la plej varman mencion meritas Oceanio !

La kvotoj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando estis altegaj—850 kaj 800—kompare kun la grandeco de la loĝantaro, kaj ili brile superis la kvotojn. Cetere, en altnivela kultur-movado, kia estas la nia, oni atentigu precipe la klerulojn : la artikoloj de F. R. Banham—erudita recenzisto—kaj la profundpensigaj poemoj de Brendon Clark estas gvidlumoj sur la vojo por ni ĉiuj. Tiuj du pensuloj brile reprezentas ne nur sian kontinenton, sed nian tutan Esperantujo.

En ĉiu libera lando—pri la aliaj nur Dio scias !—ekzistas noblaj homoj rigardantaj kiel sian konsciencan devon labori por Esperanto en la plej diversaj manieroj : verkante, instruante, varbante, propagandante, defendante la ideon kontraŭ ĉiuspecaj danĝeroj. En sia bela antaŭparolo por la monumenta verko “Kvaropo”, ĵus eldonita en la Kanariaj Insuloj, Prof. G. Waringhien diras, ke lia konvinko pri la granda estonteco de Esperanto staras sur du faktoj : la apero de speciala ideologio, “Sen-naciismo”, kaj la formado de originala poezio en la lingvo. Li pravas : la ekzisto de originala literaturo en iu lingvo ĝin eternigas en la mondo, kaj

la ekzisto de Esperantismo (ne nur Sennaciismo) en la koroj garantias la persisteman laboron necesan al la fina venko.

Niaj sportemaj samideanoj en ĉiu lando denove vetbatalu por venki la Internacian Konkurson en 1953 kaj postaj jaroj ! Ne nur la unua loko gravas : ĉefe gravas la plifortigo de U.E.A. kaj de la naciaj Asocioj !

I.G.B.

Rio de Janeiro, Brazilo,
Januaro 1953

Internacia Konkurso 1953

Stato je la 28a de februaro

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Danlando ..	2500	2345	93.8
2. Germanujo ..	3200	2915	91.1
3. Francujo ..	5200	4447	85.5
4. Maroko ..	600	510	85.0
5. Italujo ..	2400	2025	84.3
6. Urugvajo ..	250	210	84.0
7. Svislando ..	1450	1155	79.6
8. Japanujo ..	900	690	76.6
9. Britujo ..	10000	7441	74.4
10. Nederlando ..	4600	3320	72.2
11. Sud-Afriko ..	300	215	71.6
12. Finnlando ..	2200	1570	71.4
13. Aŭstralio ..	900	635	70.5
14. Portugalujo ..	600	415	69.2
15. Hispanujo ..	1500	1015	67.6
16. Svedujo ..	5500	3710	67.4
17. Kanado ..	300	195	65.0
18. Usono ..	2300	1486	64.6
19. Belgujo ..	2200	1328	60.4
20. Irlando ..	250	150	60.0
21. Norvegujo ..	2100	1230	58.6
22. Kubo ..	250	145	58.0
23. Nov-Zelando ..	900	480	53.3
24. Islando ..	450	200	44.4
25. Aŭstrujo ..	800	320	40.0
26. Argentino ..	500	170	34.0
27. Jugoslavujo ..	1500	415	27.6
28. Brazilo ..	6500	30	0.5

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

MacGill. Al Frances kaj David MacGill, D kaj FD en Pinehaven, Nov-Zelando, la 11an de januaro naskiĝis filino, Helen Rowena.

Edziĝoj

Antonelli-Kohler. F-ino D-ro Adelaide Antonelli el Romo kun S-ro August Kohler, el München, edziĝis en Romo en Januaro 1953. La ceremonion celebris hungara pastro samideano Bogliari.

Atkinson-Aston. La 21an de Februaro S-ro Wilfrid Atkinson kun F-ino Valerie Aston, antaŭa grup-sekretario en Bournemouth.

Früh-Sigg. F-ino Alice Früh, el Sankt-Gallen, kun S-ro Sigg en Zürich en Marto 1953.

Harris-Scholz. S-ro Fred Harris, D en Bath, Anglujo kaj S-ino Elsbeth Scholz el Hannover, Germanujo, edziĝis la 14an de februaro 1953, en Bath.

Al ĉiuj ni esprimas sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

Anzlovar, S-ino Mary, mortis en Trieste la 22an de februaro. Esperantistino de 1933 ŝi fidele laboris en la Esperanto-movado dum 20 jaroj.

Biehler, D-ro Wolfgang, multjara sek. de la Esperanta Societo Stiria, en januaro 1953.

Fairbairn. Je la 22a de februaro forpasis S-ro A. R. Fairbairn, D. en Newcastle-on-Tyne, Anglujo. Li estis loka urba konsilanto; Esperantiĝis 1918 ; sek. Brita E-Kongreso 1928 ; prez. B.E.K. 1952 ; prez. de Newcastle Esp. Soc., kaj vic-prez. de la Nordorienta Esp. Federacio. Aĝo 68 jaroj.

Holm. La 5an de marto mortis post longdaŭra malsano Peter H. Holm, Fredericia, Danlando, 45-jara. Antaŭa delegito de UFA kaj estrarano de Centra Dana Esperantista Ligo li aranĝis kaj gvidis kursojn en pluraj urboj.

Inman. Je la 4a de februaro forpasis F-ino Z. A. Inman, Halstead, Anglujo, 95-jara. Esperantistino de la fruaj jaroj de la movado.

Johansson, Oskar, fondinto de la Esp. grupo en Örebro, Svedujo, en novembro 1952.

Ledineg, S-ino Ida, en Leibnitz, Stirio, decembron 1952.



38-a Universala Kongreso de Esperanto

25 julion—1 aŭguston, 1953

Poŝtfako 213, Zagreb, Jugoslavujo

Banka konto : Narodna banka, Zagreb, no. 402-T-844

N-ro 5

OFICIALA KOMUNIKO

Marto 1953

Oficiala poŝtmarko : Honore al la 38-a U.K. de Esperanto la Jugoslava Ministerio de Poŝto decidis eldoni novan poŝtmarkon. La marko havos specialan desegnon ligitan kun la kongreso kaj la valoro estos 15 dinaroj (afranko por simpla enlanda letero).

Radio : Radio Zagreb komencos regulan ĉiusemajnan elsendon en Esperanto ĉiun ĵaŭdon espereble de la 16-a de aprilo je 00.05 horo laŭ mezeŭropa tempo (23.05 laŭ Greniĉ). 264.7m., 1133 kilocikloj. La elsendo daŭros 15 minutojn kaj konsistos el 5 minutoj da informado pri la U.K. kaj Esperanto ĝenerale, kaj 10 minutoj pri jugoslavaj arto, literaturo, muziko k.s.

Dua Bulteno : Jam estas sendita al ĉiu aliĝinto. Se tiuj ne ricevis, ili bonvolu kontaktiĝi kun la L.K.K. Pluraj sendaĵoj revenis kun indiko "Nekonata". Nepre sciigu al la L.K.K. pri eventuala adresosangho.

Mendoj : Pluraj aliĝintoj jam skribis al la L.K.K. pri hoteloj k.s. malgraŭ nia atentigo ne fari tion. Ni ripetas, ke ĉiuj tiaj aranĝoj estas en la manoj de TURIST, Zrinjevac 18, Zagreb, al kiu direktu ĉiujn petojn pri turismo. Notu bone ke en ties prospekto oni anoncas, ke mendojn oni traktos nur se kunestas atesto de la banko pri enpago de mono, kaj nur ĝis la 15-a de junio.

Kotizoj : Post 31 Marto la nova pli

alta tarifo validas. Ni memorigas, ke la absolute lasta dato por aliĝo al la kongreso estas la 30-a de junio. Post tiu dato L.K.K. ne akceptos aliĝojn. Aliĝiloj *devas esti en Zagreb* je tiu dato.

Postkongreso : La urbaj instancoj en Ljubljana promesis aktivan kunlaboron en la programo de la Postkongreso. Direktu informpetojn al : Organiza Komitato de Postkongreso, Mikloŝiĉeva 7, Ljubljana, Jugoslavujo.

Alveno en Zagreb : korekto : Ni ricevis informon, ke alvenas unu trajno ĉiutage je la 11.00-a horo, la Simplon Direct. Notu tion.

Pagoj : La L.K.K. petas aliĝontojn direkti siajn kotizojn al la peranto en sia lando (vidu detalojn en Dua Bulteno kaj en Oficialaj Komunikoj) aŭ se tio ne eblas, al U.E.A. Temas nur pri *kotizoj*. Aliajn pagojn direktu laŭ la avizo de TURIST en ties prospekto.

Statistiko (ĝis fino de feb.) : Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 31, Belgujo 3, Britujo 75, Danlando 24, Finnlando 6, Francujo 87, Germanujo 53, Gvatemalo 1, Hispanujo 1, Italujo 13, Izraelo 1, Jugoslavujo 393, Nederlando 27, Norvegujo 12, Novzelando 2, Pollando 1, Portugalujo 1, Svedujo 63, Svislando 24, Turkujo 1, Usono 4. Sumo 825 el 24 landoj (pasintjare 745 el 28 landoj).

Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario.

D-ro Ivo Borovečki:

*Jugoslavujo**

ESTAS ja kompreneble, ke la esperantistoj kaj precipe la aliĝintoj kaj aliĝontoj al Universalaj Kongresoj interesiĝas pri la urbo kaj la lando kie ili okazas. Niaj kongresoj havas duoblan signifon por la partoprenantoj. Unuflanke ili estas brila publika manifestacio de nia ideo kaj libera diskutejo pri la aktualaj problemoj de la movado. Aliflanke ili ebligas pli intiman kontakton kun aparta popolo, kun ĝiaj tradicioj, moroj, teknikaj kaj soci-kulturaj atingajoj. Ĝuste la perado de pli intimaj internaciaj rilatoj estas la esenco de la ideo de la Internacia Lingvo. Neniu povas aserti ke Esperanto povus solvi la antagonismojn de la moderna socio, sed neniu el ni dubas ke ĝi povas kaj devas multege kontribui al interpopola komprenemo kaj internacia kunlaboro.

Ĉijare la metropolo de nia plej granda internacia manifestacio estos Zagreb. Dum la lastaj monatoj niaj ĉefaj gazetoj kaj revuoj raportis pri la sukcesoj de nia movado en Jugoslavujo. Krome aperis kelkaj artikoloj pri la lando ĝenerale. Estas sendube, ke ĝuste Jugoslavujo estas ŝatata temo en diversaj gazetoj. Tion ja kaŭzas ĝia aparta soci-politika strukturo kaj ĝia rolo en la internacia politika kaj kultura vivo.

La rilato de eksterlandanoj al Jugoslavujo dependas subjektive de ilia ĝenerala mondkoncepto de la propra politika konvinko, kaj

objektive de ilia kono de la faktoj pri la historio kaj la nuno de la lando kaj ĝiaj popoloj. Tio senescepte validas ankaŭ pri Esperantistoj.

El nia vidpunkto skribante pri Jugoslavujo oni devas ne akcenti nur ĝiajn turismajn allogaĵojn kaj kulinarnajn specialaĵojn, ĉar nur tia priskribo povus doni iom falsan bildon pri la lando, kiu esence multe diferencas de la okcidenteŭropaj landoj.

Jugoslavujon ĉiujare vizitas dekmiloj da eksterlandanoj, ĉu oficiale, ĉu turistcele. Ilian ĝeneralan scivolon pri "la lando de Tito" akompanas tre ofte diversaj antaŭjuĝoj kaj "amikaj" admonoj kaj konsiloj. Post pli aŭ malpli longedaŭra restado ili revenas plenplenaj de novaj fortaj impresoj. Jugoslavujo amike malfermas la pordon al ĉiu vizitanto. Oni laŭplaĉe kaj tute libere povas trairi la tutan landon kaj kontakti kun personoj el ĉiuj socitavoloj. Tiamaniere eblas ekkoni ĝin en ĝia spiro.

Estante sur la geografia karto sur la kruciĝo inter la Oriento kaj la Okcidento la sudaj slavoj estis devigataj dum jarmilo defendi sian grundon. La milito, la ruĝa fadeno de nia historio, estis ofte gasto en niaj hejmoj. La heroa pasinteco kaj profunde enradikiĝinta amo al la hejmlando inspiris ankaŭ dum la lasta mondmilito la batalantojn de nia Revolucio. Dum la Dua Mondmilito pereis 1.700.000 homoj, 10% de la enloĝantoj. Oni eĉ ne povas imagi kiel aspektis la lando post la tempesto de la milito: prirabita, ruinigita, malriĉa—sed libera kaj esperplena.

* En sia manuskripto D-ro Borovečki uzis la nomon "Jugoslavio". Ĉar U.E.A. sekvas la normojn fiksatajn de la Akademio ni anstataŭigis tiun vorton per "Jugoslavujo".

La novan vivon oni devis komenci preskaŭ el nenio. Tia sorto ofte trafis nin. Ĉiu homo memoras minimume 2-3 militojn.

Kelkfoje oni aŭdas pri Jugoslavujo la nomon: la lando de kontrastoj. Fakte la vizitanto povas ĉiupaŝe konvinkiĝi pri tio. La jarcenta influo de la Oriento kaj Okcidento postlasis fortajn signojn. Jugoslavujon konsistigas ses Popolaj Respublikoj: Serbujo, Kroatujo, Slovenujo, Bosnio-Hercegovino, Makedonujo kaj Montenegro. Ĉiu respubliko havas ion sian, apartan, karakterizan. En Slovenujo fremdulo vidas ion similan al Svislando. En la Kroata Dubrovnik oni ĝuas belan Mediteranean klimaton. La altaj minaretoj de Sarajevaj moskeoj kaj la pasiaj orientecaj amkantoj memorigas pri la rakontoj el "Mil kaj Unu Noktoj."

Se la naciaj kostumoj povas iel karakterizi la regionojn, tiam nenie en la mondo oni povus pli bone diferencigi la regionojn ol en Jugoslavujo. Centoj da plej diversaj, riĉe, bunte kaj arte ornamitaj popolkostumoj forte impresas la eksterlandanojn. Antaŭ nelonge la Jugoslava popoldancista trupo vizitis la skandinavajn landojn kaj per siaj popoldancoj en originalaj naciaj kostumoj entuziasmigis la nordlandanojn. Baldaŭ la sama trupo vizitos aliajn okcidenteŭropajn landojn.

La diversecon karakterizan por Jugoslavujo montras ankaŭ jenaj faktoj: la Federacion konsistigas ses respublikoj, sed nur kvin slavaj popoloj enloĝigas la landon. Oficialaj estas kvar lingvoj kaj du alfabetoj (latina kaj kirila). Tamen la gazetoj kaj libroj aperas en deko da lingvoj ĉar en Jugoslavujo vivas pluraj naciaj minoritatoj egalrajtaj al la Slavaj popoloj. En la antaŭmilita Jugo-

slavujo la Makedonoj ne rajtis eĉ paroli Makedone. Nun ili havas sian respublikon, sian literaturon kaj la Makedonan universitaton. En Skopje vi povas viziti Turkan teatron, en Priŝtina aĉeti libron en la Albana lingvo, norde en Subotica oni povas legi Hungarlingvajn gazetojn, en Daruvar viziti la Ĉeĥan kulturdomon kaj en Rijeka ĉeesti la dramprezentojn en la Itala lingvo. La kvar oficialaj lingvoj (Serba, Kroata, Slovena kaj Makedona) troviĝas kune nur sur la bankbiletoj.

La naciliberiga batalo de la Jugoslavaj popoloj detruis la kapitalisman sistemon. La laboranta popolo prenis sian sorton en proprajn manojn. La fino de la milito starigis kelkajn grandegajn taskojn. Oni devis urĝe rekonstrui la plene detruitan landon. La kvinjara plano havis du ĉefajn celojn: industriigon kaj elektrigon de la lando. Por konstrui socialismon oni ja unue devis certigi fortan ekonomian kaj industrian bazon. Grandegaj posedaĵoj kaj ekleziaj bienoj estis transprenitaj de malriĉaj vilaĝanoj. La Jugoslavaj popoloj plenentuziasme komencis la novan batalon — la batalon por novaj fabrikoj, minejoj, hidrocentroj kaj por sia pano. La vivo estis malfacila, peniga, sed la fina celo donis moralan forton. Ne estas eta tasko, transformi iam burĝan, vilaĝanan, malriĉan landon al industria riĉa lando de socialismo.

Sed baldaŭ sur la horizonto aperis nova grandega danĝero. Tamen Jugoslavujo ne ektimis antaŭ la Sovetunio. La plena rompo kun la minacanta Orient-bloko mirigis la tutan mondon. Jugoslavujo daŭrigis firme la vojon celitan, akirinte plej fortajn simpatiojn de ĉiuj progresemaj homoj. En la internaciaj kadroj nia

lando multfoje pruvis ke ĝi batalas por la vera paco, por la internacia kunlaboro sur la bazo de egalrajto kaj sendependado. Forta apogo al Unuiĝintaj Nacioj—jen estas la gvid-principoj de nia lando rilate al eksterlandaj rilatoj.

Intertempe interne okazis kelkaj gravaj ŝanĝoj. Laŭ la nova leĝo ĉiuj fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj apartenas al la laboristoj. Nek privatuloj nek la ŝtato, sed memstaraj laboristaj konsilantaroj estras nun siajn entreprenojn kaj memstare disponas pri la profito akirita.

La nova konstitucio, la reorganizo de la Parlamento kaj la forigo de la iamaj funkcioj de la Federacia Registaro ebligis pli grandan parto-

prenon de la popolo en la gvidado de la lando. Plena decentraligo de la ŝtata administrado donis pli grandajn rajtojn al la urbaj kaj distriktaj popolkomitatoj. Ke la Jugoslavo tamen suferas pro multaj malfacilaĵoj estas ja facile kompreneble. Grandegaj investoj por la peza industrio, grandegaj elspezoj por la forta kaj bone ekipita armeo—ĉio ĉi forprenis grandan parton de la ŝtata budĝeto. Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj Jugoslavujo plenfide rigardas al la estonteco.

Sendube mi ĉi tie nur supraĵe tuŝis kelkajn aferojn pri Jugoslavujo. Nia lando estas neelĉerpebla fonto por la studoj ekonomiaj, politikaj, folkloraĵoj k.t.p. Venu al ĝi kaj esploru ĝin mem.



Vidaĵo el la komuna loĝejo, Zagreb

Dulingvismo (de paĝo 113)

diri post legado de la Akademiana prozo. Ekzistas homoj kiuj kapablas simpligi ion komplikan kaj prezenti problemon sub ŝajna aspekto funde koni la materion. La kontraŭo estas tiuj, kiuj scias komplikigi aferon en

si mem klaran kaj simplan. La ekstretoj sin tuŝas ĉie. Pri la opinio de la estiminda Akademiano oni same ridos post jarcento (kaj jam nun !) kiom oni ridas pri anoj de la sama instituto, juĝante malfavore pri la inventaĵo de Stephenson.

Hans Jakob.



Por via distro

Sendu vian plej amuzan anekdoton al M. Otiel, ĉe U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. Antaŭdankon.

Korekto

En iu parlamento membro naŭzita de la korupto tie troviĝanta publike deklaris: "Duono de la parlamentanoj estas rabistoj!"

Alvokite poste al la ŝtata juĝejo li tie devis retiri sian ofendan parolon. Por savi sian honeston li deklaris: "Duono de la parlamentanoj ne estas rabistoj!"

* * *

Tre granda viro renkontis malgrandan. Li moke diris: "Kia pigmeo vi estas; se mi volus, mi povus enmeti vin en mian mantelpoŝon". "Estus eble", la alia trankvile respondis, "sed tiam vi certe havus pli da spirito en via poŝo ol en via kapaĉo."

Teruraj infanoj

Joĉjo, kvarjara vigla knabeto, sidas en la salono kun siaj gepatroj, kiuj konversacias kun vizitantoj.

Subite li diras: "Panjo, sur la muro kuŝas litcimo".

"Silentu, stultulo", diras la patro, "tio estas najleto".

Joĉjo silentas, sed post kelke da minutoj li ekkrias: "Panjo, panjo, la najleto marŝas."

La Satano

Edzino de bienisto usona veturis en la urbon por aĉeti en la magazeno diversajn objektojn necesajn. Ŝi ne povis rezisti al tento aĉeti ankaŭ novan kostumon. Kiam ŝi venis hejmen ŝia edzo koleriĝis kaj diris, "Kial vi aĉetis kostumon? Ĉu vi ne havas sufiĉe da vestaĵoj?" "Certe,"

respondis la edzino, "sed la Satano tentis min." "Tiam vi devis vidigi al la Satano la dorson kaj diri: cedu Satano!" "Tion mi ja faris," diris la edzino humile, "sed li flustris trans mian ŝultron: de dorse ĝi vestas vin ĉarme."

Infana disputo

Je la matenmanĝo la eta Petro plendas pri sia pli juna fratino: "Panjo, Henjo montras al mi sian langon." La patrino respondas: "Granda knabo tiajn malafablaĵojn punas per malestimo." Post iom da tempo plendas Henjo: "Panjo, supre li punas min per malestimo kaj mal-supre li puŝas min per la piedoj."

Erara diagnozo

Disputante diris kuracisto al sia kolego: "Ĉu eble vi neniam eraris pri diagnozo?" "Certe," respondis la alia. "Unufoje mi kuracis pacienton per malvarmaj kompresoj, kaj poste mi konstatis, ke li estus havinta la monon por operacio."

Akcidento

Ĉe arbo kuŝas detruita aŭtomobilo. El la ruinaĵo elgrimpas junulo kaj junulino. Ravite ŝi diras: "Jen, karulo, tion mi nomas tutkora kiso!"


Gaja Leganto per Esperanto

de P. E. SCHWERIN

Amuza libreto por ĉiu.

56 paĝoj, 1ŝ. 2p. aŭ 4 rpk.

Mendu ĉe U.E.A.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

*Infanoj de l'Atombombo.

Kompilis D-ro Osada Arata ; tradukis Kansai-Ligo de Esperantaj Grupoj. 18×12.5cm., 70 paĝoj, broŝ. 3ŝ. 3p., afranko 2p.

Kun la celo montri la teruraĵojn de la atombomba militado, kaj disvastigi abomenon al militoj ĝenerale, Prof. D-ro Osada, el la Hiroŝima Universitato, eldonis en 1951 kolekton de memoraĵoj verkitaj de gejunuloj travivintaj la atakon ĉe Hiroŝima ses jarojn antaŭe. Tiu kolekto (mem konsistanta el elektaĵoj el amaso da materialo) estis en la japana lingvo, sed Kansai-Ligo de Esperantaj Grupoj dum 1952 decidis eldoni resuman tradukon en Esperanto de trafa parto de la originalo, per helpo de aro da individuaj kaj grupaj tradukantoj : kaj la nuna broŝuro estas la rezulto.

La gejunuloj, kies teruraj spertoj ĉe kaj apud Hiroŝima estas ĉi tie prezentataj, estis en 1951 aŭ ankoraŭ lernejanaj, aŭ kolegiaj studentoj : je la dato de la atako ili do estis tre junaj—kelkaj havis nur kvar aŭ kvin jarojn—kaj la rakontoj estas des pli kortuŝaj kaj impresaj. Plejparte ili estas verkitaj kun notinda objektiveco, sen penado al emociigo aŭ retorikaj aldonaĵoj : plue, la lingvaĵo mem estas simpla, kaj montras en sia Esperanta formo admirinde klaran stilon. Pri tio oni povas nur gratuli ĉiujn koncernitajn. Kaj estas ja esperinde, ke ĉi tiu elmontro de la rezultoj de atombombaj atakoj helpas emfazi tion kio

okazus, se tiaj bataliloj iam estus grandskale uzataj—des pli ĉar oni nun minacas la mondon per bomboj multe pli potencaj ol tiu uzita ĉe Hiroŝima.

Kvankam la lingvaĵo estas, kiel mi indikis, bonega, mi notis kelkajn vortojn ne tute rekomendindajn. Sur pp. 6, 38 kaj 39 la radiko *domaĝ'* estas uzata kie la vera signifo estas *detru'* aŭ *difekt'*. Sur pp. 41 kaj 42 aperas *flos'* kie *flot'* estus multe preferinda : kaj sur p. 21, *helmeto* supozeble estas sinonimo de la malnova vorto *kasko*. *Mokisto* sur p. 55 mi ne komprenas : eble ĝi estas loka teknikaĵo, kvankam ĝi ne troviĝas en la mallonga listo de tiaj vortoj je la fino de la broŝuro.

Unu vorton uzatan en la broŝuro mi forte malŝatas, nome *Koreio*. Nek ĉi tiu formo, nek *Koreujo*, ŝajnas al mi fonetike taŭga por nia lingvo. Plue, de okcidenta vidpunkto la nomo de la lando devus esti *Koreo* (kun *koreanoj* por la enloĝantoj) : sed se niaj orientaj samideanoj iakiale ne ŝatas ĝin uzi, mi sugestas al ili la formon *Korelando*, kiu estas fonetike taŭga kaj ankaŭ belsona.

Bernard Long.

La Konsilanto pri la Esperanta Gramatiko, de G. J. Degenkamp. Dua tute reviziita eldono. 105 paĝoj. Prezo 2.75 guldenoj. Eldonaĵo de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj, Heemstedestr. 44, Amsterdam W., Nederlando.

Ĉi tiu libro verkita en la nederlanda lingvo, same kiel la unua eldono, certe povos helpi multajn komencantojn en la studo pri nia lingvo. Speciale al tiuj personoj, kies scio pri la nederlanda gramatiko ne plu estas freŝdata ĝi povas esti tre utila. En malgrandaj ĉapitroj la verkinto, kandidato por la Akademio, pritraktas diversajn malpli facilajn partojn de la esperanta gramatiko kaj donas sian propran starpunkton rilate al kelkaj punktoj pri kiuj diversaj gramatikistoj ankoraŭ ne samopinias.

La libro estas kartone bindita kaj la preso estas tre klara, la papero tre bona. Vere rekomendinda libro por nederlandanoj.

F.W.

***Jarlibro 1953.** Unua parto. Universala Esperanto-Asocio. 15 × 11.5 cm., 271 paĝoj. Nur por uzo de membroj.

Preskaŭ 5600 esperantistoj ricevis antaŭ nelonge multvaloran libron. Ĝi ne estas grandampleksa, ne enhavas streĉan aŭ altnivelan legaĵon, nek ravas la okulon per belegaj bildoj. Ĝia multvaloreco konsistas el io alia, nome el ĝia praktika utilo. Ĉi tiu libro utilas al esperantisto kiel telefon-adresaro al uzonto de telefono, kiel hortabelo al iu, kiu vojaĝos fervoje, kiel urboplano al tiu, kiu troviĝas en fremda urbo. Ĝi servas por trovi la vojon por uzi eblojn, kiujn prezentas la scio de Esperanto kaj la membreco al UEA. Temas pri la Jarlibro de UEA ĉi supre menciita.

271 paĝojn ĝi ampleksas ĉi jare, do dek pli ol tiu de 1952. Kvankam supozeble ankaŭ la anoncoj kontribuis al ĉi tiu pliampleksiĝo, oni tamen rajtas ĝoji pri ĉi tiu kresko.

La enhavo konsistas kiel kutime el ĉiaj informoj oficialaj, adresaro de asocioj, de gazetoj, listo de novaj

libroj, de mallongigoj, adresoj de delegitoj, k.t.p. Io nova estas la "Interesaj ciferoj pri UEA", kiuj donas informojn pri nombro de membroj, delegitoj, landaj organizaĵoj, servoj, k.t.p. Ni ekscias el tio, ke la delegitoj faris en 1952 pli ol 4000 (kvar mil !) servojn. Sendube inter ĉi tiuj estis gravaj kaj negravaj, sed tamen ĉiuj valoras, ĉar temas pri internacia reciproka helpado.

Mi havas kelkfoje la impreson, ke la esperantistoj ne sufiĉe *uzas* sian lingvon. La jarlibro de UEA donas al ili la okazon por tio.

Recenzinto.

Esperanto Mittler der Weltliteratur de Wilhelm Theodor Oeste. 21 × 15 cm. 96 paĝoj. Siegfried Ziegler Verlag, München-Pasing, 1952. Prezo 4.50 Gmk.

Esperanto, peranto de la tutmonda literaturo, titoliĝas tiu ĉi germanlingva libro. Estas alispeca provo interesigi flankestarantajn personojn je nia afero kaj ni konfesu, ke la provo meritas sukceson.

La libro formas kvar partojn, enkonduko, ĉapitro pri la strukturo de la tutmonda lingvo, "Artefarita kaj natura lingvo", fine "Esperanto, peranto de la tutmonda literaturo". Temas do pri informa verko ĝenerala.

La kompilinto penadis montri la flekseblecon kaj elastecon de Esperanto uzante la verbon *helpi*. Sur kvar paĝoj troviĝas la maksimumo de eblecoj krei vortojn el ĉi tiu verbo, pere de la afiksoj. Ĉu vortoj kiel *fihelpigadi*, *fimalhelpigadi*, *helpagazadi*, *malhelpularestro* kaj aro de similaj kombinaĵoj estas pruvo pri la tuja elasteco de nia lingvo, estas dubinda. Tiaj tro serĉitaj kombinaĵoj ne trafas la celon; ili similas je mondlingvo pereinta, precize pro troa artefariteco.

La parto “Artaj kaj naturaj lingvoj” estas lerta kompilaĵo de aro da strangaĵoj el la tielnomataj naturaj lingvoj, el angla, franca, kaj germana. Tiu ĉi ĉapitro valoras esti tradukata en aliaj lingvoj respektive uzata por kaj per aliaj lingvoj por kontraŭbatali la diraĵon “arta, retorta” pri nia lingvo. Esperanto estas tiom natura, kiom estas naciaj lingvoj; dependas de la starpunkto de la kritikanto. Aliaj ekzemploj pri la evidenta supereco de la vortfarado en Esperanto, estas la komparo de prepozicioj kaj diferenca uzo de verboj, sekvata de etimologiaj kuriozaĵoj, strangaĵoj el aro da lingvoj.

La lasta ĉapitro rilatas al la titolo de la libro mem. La kompilinto diras komence: *Spite ĉian flekseblecon kaj elastecon kompare al la tradicia lingvo-praktikado, Esperanto posedas propran karakteron kaj simile kiel ĉiu alia kulturlingvo, posedas tion kion oni komprenas sub “la spirito de lingvo”, nome, ian fluidaĵon propran al ĝi, kaj kiu estis kvazaŭ enspirita de la kreinto.*

Pli ol la duonon de la libro okupas specimenoj de tradukoj el la tutmonda literaturo, de *l'Iliado* ĝis la *Aŭtuna Kanto* de Verlaine. Vico da grekaj, latinaj, ĉinaj, anglaj, francaj, germanaj kaj rusaj poetoj prezentiĝas per bone elektitaj interpretaĵoj de poemoj. La kompilinto uzis la sistemon interlinian: unue la originala teksto, due la interpretaĵo en Esperanto kaj trie la germana, laŭvorta, traduko. Tio eble ne plaĉos al literaturistoj kaj mi mem estus preferinta tiukaze la *paralelon germanlingvan* (la traduka literaturo germanlingva ja abundas en tio!). Mi citu nur titolon: *The last rose of summer*. La Esperanta formo tute konvenas laŭ ritmo kaj sono: “la lasta rozo de l’somero”. Germane,

tute konforme al la ritmo de la lingvo: *Des Sommers letzte Rose*. La kompilinto opiniis pli bone diri: *Die letzte Rose des Sommers*.

El *Faust* la esperanta interpreto, de Barthelmess, de la prologo en la ĉielo estas unuaranga, egala al tiu de Sabatier en franca lingvo, konservanta la internan ritmon kaj bildecon de la lingvo de Goethe. Domage, ke la kompilinto ne uzis do tiun interpretaĵon konatan jam al multaj samideanoj. Mankas la loko tie ĉi por eniri pli detale en tiun ĉi problemon, ĉu traduki kaj retraduki en nacian lingvon iun tekston en Esperanto. La kompilinto ja diris tre prave, ke nia lingvo posedas ĝian propran karakteron kaj ne estas nura “egal-direktigo” senanima.

Ĉi tiuj observoj neniel malgrandigas la valoron de la kompilaĵo. Ĝi inicias je profunda ekkono de nia lingvo kaj havigas eĉ al sperta Esperanto-lingvisto aron da utilaj sciindaĵoj. Plaĉa prezento kaj agrabla literaro paralelas kun la enhavo. Ke ĝi trovu multajn legantojn kaj... aĉetantojn!

Georges Agricola.

***Kvaropo,** poemoj de Auld, Dinwoodie, Francis kaj Rossetti. Eld. J. Régulo, La Laguna, Kanariaj Insuloj. 270 paĝoj, 22.5 × 16 cm. Broŝurita 10 ŝil., aŭfranko 8p.

La eleganta eksteraĵo, bona preso, arta titolbildo de R. Rossetti kaj la antaŭparolo de G. Waringhien streĉas la atendon de la leganto kaj la enhavo de la libro plene kontentigas la pretendojn. La “Skolta Skolo”, kies manifesto estas la libro, plenmerite transprenas la heredaĵon de la budapeŝta riĉo kaj aldonas novajn trezorojn. Tiu ĉi skolo, konsistanta el tute diferencaj poetaj individuoj, signifas unuavice kuraĝan riĉigon de

la lingvo kaj ĝian adapton al la tempo, kiu spite la iluzion de multaj restemuloj ne emas halti.

W. Auld versas en la duono de la libro. Tiu ĉi juna poeto estas sendube geniulo. En lia junece ŝanĝema poezio vaste ondas la sentoj kaj lia kolosa forma talento majstre akompanas la impulsojn de la socia indigno, senbrida vira ĝojo, aŭ ebria humoro, optimismo aŭ pesimismo, erotika plezuro aŭ sopiro, amo aŭ malamo, kareso aŭ moko.

Tiaspeca temperamento, kies impulsoj rapide sekvas unu la alian, facile inundas kaj ĝiaj reagoj povas esprimi sin kun tia naturfideleco, ke bonkonduktuloj emos skui la kapon, sed neniu povos nei, ke la senpoza poezio de Auld estas ege interesa taglibro de facile vibrigebla, sincera animo. Auld jam nun apartenas al niaj plej grandaj poetoj, kun konkretaj kondiĉoj por gigantaj literaturaj faroj. Lia mondo estas la aktualo kaj li ne timas refuti sin mem. Estas bedaŭrinde, ke unu el liaj impulsoj esprimiĝas en, cetere forme majstra, satiro kontraŭ Baghy; la iama kontraŭ-neologisma sinteno de Baghy validis nur la ekstremaĵojn de la tendenco, kaj speciale en la lastaj tempoj Baghy en sia izoliteco esploras la saman problemon, kiun la skota skolo, t.e. la adapton de la lingvo al novaj postuloj.

El la ege multaj citindaj, ni citu unu poemon de Auld, unikan, ĉar ĝi fidele priskribas maloftan, pasivan momenton de konstante maltrankvila animo. La titolo de la poemo estas

Pluva Nokto

*En longaj vicoj stratolampoj pale
aspergas lumon al la nokt' kusena;
pluveroj rosas sur la lun' vuale
kaj falas flirte al la strat' malplena:
kaj mi sen celo
promenas en malhelo*

*kun la rigard' premata al pavimo,
dum nur vakuo vibras en l'animo.*

Dinwoodie distingas sin per kristale pura liriko, forme perfekta, enhave tute matura poezio. Li estas humila pilgrimanto al la eternaj fontoj de la amo, kompreno kaj harmonio.

*Neniam mi aspiris honorojn de la mondo:
la simplaj vivoĝvoj, la familia rondo
por mi sufiĉis.
La vivo al mi donis amikojn simpatiajn,
edzinan amon, hejmon, aliajn benojn tiajn,
kaj mi ja riĉis.*

li diras en unu el la poemoj kaj poste benas la dornojn de la vivrozoj, kiuj elvokis lin el la kontenta vivmalpleno kaj egoismo. La poezio de Dinwoodie estas melankolia, sed ne rezigna, fidoplena, li estas velurvoĉa pastro de prakristana justopostulo por la humiligitoj kaj subtretitoj. La naturmedio de tiu ĉi vortmuziko estas ofte opale glima pejzaĝo, iaspecaj Carot-pentraĵoj en vortoj, neniam forgesebaj. Dinwoodie estas granda kaj matura poeto.

Oni admiras la kosman fantazion de la juna J. Francis. Lia granda poemciklo "La kosmo" ampleksas la evoluon de la komenco, kiam

*Senvive sin etendas vakua firmamento
kun sole aktuala la nigra de nenio: . . .*

ĝis la fino, kiam denove venas la malpleno

senvive sin atendas vakua firmamento.

En tiu ĉi jarbiliona kosmo la homo estas sensignifa estaĵo. La pozitiva formo, reala prezento kaj la tipe epikaj aleksandraj versoj kaj la homgravon neanta enhavo kune donas incitan paradokson, ian poezian transkapiĝon, kies bravurojn ni admiras precipe en la komenco de la poemo. En la meza parto la prezentado, ĝia didakta tono kaj la pli kaj pli oftaj -as rimoj, sen la ŝanĝo de la ritmo, monotonigas la en sia tuto admirindan poemon.

Francis, same kiel aliaj, bezonas neologismojn kaj escepte kelkajn, kiuj estas diskuteblaj, oni volonte konsentas pri ili. Mem Zamenhof akcentis la neceson de lingva pliriĉigo, kompreneble kun nepra kontinueco kaj singardo. Nia rimarko nun rilatas teknikan mankon: multaj el tiuj neologismoj, kiujn Francis, Auld kaj Rossetti uzas, ne aperas en la aldonitaj listoj kaj ankaŭ ne en la Plena Vortaro. Kelkfoje oni povas per detektiva laboro konkludi pri la signifo de vortoj ekz. *karapaco*, kiun Auld uzas en "ŝlosilpozicio", sed ofte la leganto estas senhelpa. La vort-listoj estas nepre reviziendaj.

Rossetti ravas nin per sia trobadora eleganteco. Jam lia "Manifesta balado" kaptas nin:

*Ni ja medias en la ŝimo
De mond' murdanta la honeston,
Do saltu ni el anonimo
Kun fajra glavo kontraŭ l'beston!
El rub' ni faru flagran feston
Kun aroganta karmanjolo;*

*Ĉar certe tuŝos ne asbeston
Flam-sago de la skota skolo!*

La kapreolaj rimoj kaj la facileco de la formo, pri kiu Rossetti "ĉef-talentas" (laŭ la rondelo de Auld) gvidas nin al tre seriozaj klopodoj de la poeto. Ofte nin haltigas kurioze uzataj vortoj, sed ni tuj povas konstati, ke Rossetti volas nin haltigi, vekti, spiti, kiel:

*La ondoj en alborda pelo
kontraŭ la tajdrefluo penas—*

Ĉiuj, sed precipe Rossetti donas sian omaĝon al la titana, direktanta genio de Kalocsay, kies influo ne estas hontinda. Tamen multaj poemoj de Rossetti jam anoncas tute rossettian tonon (Kroniketo, En abismo, Tamen k.s.)

Resume pri la libro: ni plene konsentas kun la opinio de G. Waringhien: "Tia lingvo, kiu inspiris tiujn ĉi versojn, estas io granda, kaj ne povas formorti."

F. Szilágyi.

Tri monumentoj de la mondliteraturo

varme rekomendataj de la tuta Esperanta gazetaro pro la lingva perfekteco:

La Libro de la Spiritoj, de Allan Kardec, trad. de Porto Carreiro Neto.

Enhavanta 1018 demandojn kun detalaj respondoj pri ĉiuj problemoj de la homa vivo antaŭ kaj post la morto.

1 vol. 532-paĝa, bonega papero, broŝ. 10ŝ. 6p., aŭfranko 9p.

La Evangelio laŭ Spiritismo, de Allan Kardec, trad. de I. G. Braga.

Ĝi estas la plej klara eksplikado de la kristana religio el vidpunkto spiritisma.

1 vol. 432-paĝa, broŝ. 8ŝ. 6p., aŭfranko 8p.

Antaŭ du mil jaroj . . . de F. C. Xavier, trad. de Porto Carreiro Neto.

Historia romano pri la naskiĝo de Kristanismo kaj la Roma politiko de la 1-a jarcento de nia epoko.

1 vol. 400-paĝa, broŝ. 15ŝ., aŭfranko 6p.

Mendu ĉe

**Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo**

Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.



La inundo en Nederlando

De multaj grupoj kaj izolaj gesamideanoj mi ricevis leterojn en kiuj ili esprimis kunsentojn al nia lando pro la inundego, kiu trafis nian landeton. Grupoj kaj izolaj gesamideanoj el Hispanujo, Belgujo, Britujo k.t.p. pruvis ke la esperantista koro batas kiel ĉiam.

Samideano el Ottignies eĉ sendis monon, kiun mi tuj transigis al la Nacia Helpfondaĵo post katastrofoj, kiu estas la oficiala instanco. Al vi ĉiuj la nederlanda popolo tre kore dankas kaj premas viajn manojn.

*Jakob Telling,
Ĉefdelegito de UEA.*

Alvoko al Radioaŭskultantoj

El diversaj landoj venis al ni petoj pri aŭskultebleco de la diversaj radiostacioj, kiuj dissendas esperantlingvajn programojn.

Kelkaj novaj aŭskultantoj, kiuj vane serĉadas kvinminutan elsendon ne scias, ĉu ili devas kulpigi netaŭgecon de sia ricevilo, difekton de sia horloĝo, nesufiĉan sendpotencon de la stacio, aŭ fantazion de la programredaktisto, kiu deziras plilongigi la liston por plenigi sian paĝon. Aliaj trovas intereson en eksciado de la trafpovo de ĉiu stacio kaj komparo kun la propraj atingitaj rezultatoj.

Certe, informo kiu validas por iu ne validas por alia samlandano, eĉ samurbano, pro diverseco en konstruado kaj instalado de la radioaparatoj. Aŭdebleco varias ankaŭ laŭ sezono kaj atmosfera situacio. Krome, al tiuj, kiuj ne povas kapti mallongajn ondojn restas nur duonigita elektopovo: ni bedaŭras ke du el la plej interesaj programoj tial malaperas el la listo por granda nombro de aŭskultantoj.

Ni tamen ŝatus raporti pri rezultoj atingitaj per komunaj, modernaj aparatoj venditaj por uzo de ne-profesiuloj: forteco, komprenebleco, ofteco de aŭskultado aŭ aŭskultprovoj, k.t.p. Ĉiujn-ĉi informojn ni mem povas doni nur kun la helpo de la diverslanda aŭskultantaro. Ni esperas, ke niaj legantoj bonvolos kunhelpi en ĉi-tiu rubriko. Ju pli granda estos la nombro de raportoj, des pli ĝusta estos la ĝenerala raporto.

Sed kompreneble, tio ne devas malmultigi la nombron de leteroj sendotaj al la stacioj mem; ĉi tiuj estas ege utilaj al la daŭrigo de la elsendoj, ili kuraĝigas kaj helpas la iniciatintojn en iliaj malfacilaj klopodoj. Unue raportu al la stacioj kaj due skribu al ni se restas al vi sufiĉe da korespondemo, da poŝtmarkoj, kaj se vi sentas la utilon de tia rubriko.

Ni antaŭe dankas pro la respondoj ricevotaj de la redaktisto de ĉi-tiu artikolo :

*G. Larglantier,
29 Boulevard Murat,
PARIS 16, Francujo.*

Reklamiloj kaj Prospektoj en Esperanto

Kiel tradukanto por urba trafik-oficejo mi spertis, ke multaj gesamideanoj agas treege malprudente. Oni imagu, ke tre ofte estas grandega laboro konvinki oficialan institucion pri la utilo kaj eventuala profito de propagando per Esperanto, kaj poste kelkaj mallertaj alskriboj povas kaŭzi, ke la eldonintoj de esperantlingvaj prospektoj kaj reklamiloj rikoltas tute la kontraŭon de tio, kion ili imagis.

Se iu samideano deziras posedi esperantlingvan reklampresaĵon, kiun oni eldonis en lia patrujo, ĉiam oni petu ĝin por *eksterlanda* amiko (kaj ne por si mem !) kaj oni skribu tiam en sia gepatra lingvo, ĉar la oficistaro de la trafik- kaj foir-oficejoj certe komprenas unuavice la nacian lingvon, kaj per esperantlingva skribaĵo de *samlingvano* al oficejo en la *sama* lando oni ridindigas nian movadon kaj ideon.

La trafik-oficejestro, por kiu mi tradukas la alvenintajn skribaĵojn en Esperanto, ĉiam ridas, kiam li donas al mi petskribojn por prospekto kiuj estas skribitaj de germanoj aŭ de aŭstroj (alvenis ankaŭ jam petskribo el la germanlingva parto de Svisujo en Esperanto) en Esperanto. Kaj li estas prava, ĉar tio estas ridinda !

Gesamideanoj tutmondaj, petu reklamilojn kaj prospektojn en Esperanto, sed por utila celo, kaj skribu klare kaj prudente, por ke la neesperantistaj eldonintoj ekkonu la

valoron de la internacia lingvo por propagandaj kaj reklamaj celoj ! Ni agu racie !

FoLo.

Pri Esperanto-Hispana vortaro

Nia klera samideano J. Régulo Pérez faris kritikon pri nia Esperanto-Hispana Vortaro (*Esperanto*, n-ro 553) kiun mi legis nur nun, pro unujara foresto kaj sekva nericevo de la gazeto.

Ni bonvenas la kritikojn kaj sugestojn. Prave S-ro Régulo Pérez diris, ke tiu verketo estas kelkrilate kaj plurloke plibonigebla. Ni jam agnoskis ĝian neperfektecon kaj petis la kritikan helpon kaj indikojn de la kapablaj gesamideanoj por eventuala dua eldono. Pro tio ni vere bedaŭras, ke nia Kanaria samideano ne sendis al ni la liston de la ĉefaj eraroj kiujn li trovis. En la recenzo li indikis nur unu, kiu tamen laŭ mi tute ne estas eraro. Temas pri la vorto *afido*, kiu laŭdire de nia kritikinto, estas eraro kiun ni kopiis de la Plena Vortaro.

Plurloke montriĝis ke ni ne sekvis sklavece la Plenan Vortaron. Tial ni ne tradukis, ekz. "polipon : pulpo" ĉar polipo estas besto tute alia ol polpo (hispane : *pulpo*) kaj ni konsideras ke tiu dusenceco de la vorto estas konfuziga.

Estante zoologo, kiu jam delonge kontribuas al prilaborado de la esperanta zoologia terminaro, kompreneble mi speciale prizorgis tiufakan terminaron. *Afido* ne estas eraro kaj ĝi indikis ne genron *Aphis*—malfacile rekonebla de la laikoj—sed tutan familion kies vulgara nomo estas en hispana lingvo *pulgón*. Tiu familio nomiĝas *aphidae*, hispane *afídidos* aŭ *áfidos*, kiel S-ro R. Pérez povas legi en la *Historia Natural de Gallach* (dua volumo "senvertebruloj")

p. 295) aŭ en la hispana traduko de la libreto "Insektoj" de Gross (Edit. Labor) kaj multaj aliaj verkoj . . . Tial ke la afidoj entenas ne nur la genron *Aphis*, *Schizoneura*, *Toxoptera* kaj aliajn, ne konvenas preni por la tuta grupo la nomon de unu genro. Se temus pri scienca verko kaj ni dezirus substreki ke ni priparolas familion (t.e. specialan grupon) ni povus diri *afideoj*. Do, *afido*, de la latina *aphidae*, estas la ĝusta vorto por *pulgón* (hisp.), *puceron* (france) k.t.p.

La riproĉeto pri manko de kunlaborado de hispanaj samideanoj ankaŭ ne estas tre justa, ĉar unue, s-ano Fernández Menéndez, kvankam jam delonge enradikiĝinta en Urugvajo, estas hispano. Alie, kiel ni jam indikis en la enkonduko, la vortaro urĝis kaj ni devis sufiĉe rapide labori pro tio ke, almenaŭ en Ameriko, tute ne ekzistas vortaro. Montriĝis ankaŭ, ke la kunlaborado kun la hispanoj ne nur malfruigos la aperadon de la verko sed ke ankaŭ ĝi estus tre malfacila. Tiutempe oficiale ne ekzistis hispana movado kaj eĉ en la Kanariaj Insuloj la movado ricevis fortan baton. Krome, pere de nia vortaro ni celis ne nur reeldonadon de jam ekzistanta libro, sed novan kiu entenus almenaŭ kelkajn amerikanismojn kaj ankaŭ nomojn de kelkaj amerikaj aĵoj, gravaj kaj bone konataj en la kontinento sed pri kiuj la eŭropaj vortaroj tute malatentas. Ni nur enmetis kelkajn tre malmultajn el tiuj vortoj (gaŭĉo, pampo, pumo, mateo) kiuj jam estas pli-malpli internaciaj.

Ni donis por kelkaj vortoj la ekvivalentajn nomojn uzatajn en Ameriko kaj ĝenerale ankaŭ la tute "hispanan" tradukon. Persiko, ekz., estas tradukita *durazno*, *melocotón*,

tial ke la vorto *melocotón*, uzata en Hispanujo, estas preskaŭ nekonata en multaj sudamerikaj landoj. Ni kredas ke la vortaro estas same bone uzebla de la hispanoj kiel de hispanparolantaj amerikanoj.

Fine mi aldonas, ke en Esperanto-Hispana parto montriĝis necesa la traduko de kelkaj vortoj laŭ ĝenerala uzado eĉ kiam ni estas kontraŭ tiu uzado. Ekzemple: *bulbo*, kiun ni kredas tute nekonvena por la vegetaĵo kies korekta nomo devas esti *cepo*. En Hispana-Esperanto parto mi donus, kontraŭe, *cepon* kiel unikan tradukon por *cebolla*.

E. Balech, Argentino.

Biografioj de D-ro Zamenhof

Aldone al la listo de biografioj pri D-ro Zamenhof publikigita en *Esperanto* n-ro 565, mi aldonas verkon de Drezen en kroatlingva traduko eldonita en Osijek. Jen la preciza bibliografia noto:

E. Drezen : Zamenhof—Osijek, Izdanje "Antaŭen".

Ŝtamparo u tiskara Friedmann 1936. 16.5 × 12 cm.

48 paĝoj + 1 bildo. Eldonkvanto 1000.

La traduko estis farita de Aleksandar Šandor Turković sed tio ne estas menciita en la libro.

Marinko Gjivoje, Zagreb.

Laŭ afabla sciigo de s-ro Ismael Gomes Braga ekzistas ankaŭ biografieto pri d-ro Zamenhof en portugala lingvo; nome la de li verkita "Vida, idéias, lógica e obra de Zamenhof" (Vivo, ideoj, logiko kaj verko de Zamenhof). 16 paĝoj. Rio de Janeiro, 1944.

Oratora Konkurso : Oslo 1952

La temo por la junaj konkursintoj estis "Kial mi batalas por Esperanto". La tri premiitoj estis : S-ro Nicola Minnaja el Romo, F-ino Inga-Maj Adamson el Göteborg kaj F-ino Hella Lanka el Hamburg. Kompreneble la paroladoj ne estis skribitaj kvankam eble preparitaj, sed oni registris ilin kaj sube ni donas la tekston de la parolado de Nicola Minnaja.

ESTIMATAJ GESAMIDEANOJ, por mi ne estas facile diri la kaŭzojn, pro kiuj mi batalas por Esperanto, ĉar ili estas tiom multaj, tiel sendependaj inter si, tiel konfuze sentataj de mia cerbo kaj de mia koro, ke eĉ mi mem ne povas bone ilin distingi unu de la alia.

Mi devas antaŭ ĉio diri, ke por mi ili ne estas la samaj, kiel por la pli granda parto de la Esperantistoj : preskaŭ ĉiuj antaŭ ol komenci la studadon de la lingvo pensis : "Esperanto estas facila kaj mi ne devos dediĉi multan tempon por ĝin lerni . . ." aŭ eble : "Esperanto estas neŭtrala kaj egala por ĉiuj ; uzante Esperanton ĉiuj popoloj sentas sin je la sama nivelo", aŭ kelkfoje : "Esperanto estas lingvo de idealistoj ; mi mem estas homarano, mi ŝatus, ke ĉiuj homoj parolu unu saman lingvon, ĉar tiel ili vere sentus sin fratoj unuj de la aliaj." k.t.p.

Mi devas konfesi, ke neniu el tiaj pensoj instigis min lerni Esperanton. Efektive, kiam mi komencis balbuti la unuajn Esperantajn silabojn, mi eĉ ne havis la memsokapablon fari tiel longajn rezonadojn, ĉar, karaj gesamideanoj, mi estas denaska Esperantisto.

De la unua tempo de mia infaneco (cetere ne tre malproksima !) mi komencis ŝati kaj ami Esperanton : mi ŝatis ĝin ĉar ĝi estis belsona al mia orelo, mi amis ĝin ĉar miaj gepatroj parolis ĝin ofte kun mi.

Kiam mi estis proksimume dujara, en mia esperantista vivo okazis io escepte grava, kiun mi neniam povos

forgesi : en la gazeto *Heroldo de Esperanto* aperis du fotoj de mi kun granda verda stelo sur la brusto, akompanataj de mallonga klariga artikolo, anoncanta interalie, ke mi baldaŭ finos du jarojn, kaj invitanta la gelegantojn sendi al mi gratulojn pro tio. Tial, okaze de mia festo mi ricevis multajn kartojn kaj leterojn el diversaj landoj. Inter ĉi tiuj gratulkorespondaĵoj, mi aparte volas prezenti al vi unu : la karton, kiun sendis al mi el Oslo S-ro Schjerve, kaj kiun subskribis pluraj lokaj gesamideanoj, inter kiuj ankaŭ S-ro Støp-Bowitz, nuna Prezidanto de la L.K.K. Ĝi jene tekstas :



La familio Minnaja : Nicola staras je la maldekstra flanko

“Koran gratulon ! Ni festos vian tagon. Kiam vi estos pli granda vizitu nian belan landon ! Ĝi estas preskaŭ tiom bela, kiom la itala lando. Bonvenon !”

Do vi vidas, karaj gesamideanoj el Oslo, ke post dekdu jaroj mi danke akceptis vian afablan inviton kaj mi venis viziti vian landon vere tre belan; kaj mi ĝojas se mi povus persone konatiĝi nun kun ĉiu el la tiamaj subskribintoj.

La artikolo aperinta en *Heroldo* havis ankaŭ alian sekvon : inter la gratulintoj estis usonano tiam loĝanta en Svisujo, S-ro John Robertson, kiu post kelkaj monatoj venis viziti Italujon kaj venis ankaŭ al mia hejmo. Li interparolis kun mi, aŭ, pli pompe, mi povas diri, ke li intervjuis min, ĉar pri tiu renkontiĝo li raportis en artikolo aperinta en la gazeto *La Praktiko*, titolita “La plej juna itala Esperantisto”, ilustrita per foto de li mem farita al mi kun paĉjo sur placo Sankta Petro. Sed en la titolo estis malgranda erareto, ĉar efektive la saman tagon, kiam S-ro Robertson fotografis min, naskiĝis mia frateto Karlo, kiu estante kiel mi denaska Esperantisto, forprenis de mi tiun rolon de plej juna Esperantisto itala tuj de sia unua vivtago.

Jam en tiu epoko oni donacis al mi kelkajn belajn ilustritajn Esperantajn librojn : antaŭe mia panjo legis laŭtvoĉe la tekston kaj montris al mi la bildojn, per kiuj mi tre amuziĝis ; poste, kiam mi estis proksimume trijara kaj mem komencis legi, mi povis pli ofte ilin rigardi kaj pli bone ĝui ilian enhavon. Kaj mi aparte ŝatis du, kiujn mi bone memoras ankoraŭ nun. Jen ili : unu estas *Esperanto por Infanoj* de Gladstone Solomon, sed mi kutime ne nomis ĝin laŭ la titolo, sed ‘la libro

de la musetoj’, ĉar ĝi rakontas la travivaĵojn de musa familio, kaj inter la malgrandaj musetoj mi havis specialan simpaton por unu, Johano, sendube pro liaj multaj petolaĵoj kaj stultaĵoj, kiuj igis lin simila al vera knabeto. La alia libro estas *Gaja lernolibro de Esperanto** de Walter, kies sprita kovrilo tuj altiris min, kaj kies multenombraj bildoj estas tre trafaj kaj plaĉaj.

Kelkajn jarojn poste, mi volis lerni la gramatikon, kaj mi konstatis ĝian facilecon ; mi legis plurajn librojn, kaj mi ĝuis la literaturon. Tiel pere de Esperantaj tradukoj mi povis ekkoni ĉefverkojn de fremdaj literaturoj, kies itala traduko ne ekzistas. Kaj inter ĉi tiuj mi aparte taksas valora la tradukaĵon de *Kroniko japana*, kiun mi komencis legi ĝuste antaŭ kelkaj tagoj. Sed eĉ pli multe ol la tradukaĵoj vekis mian atenton kaj intereson la originalaĵoj, kaj ne nur la tre valoraj romanoj de Vallienne, Luyken, Forge, Baghy, Rossetti, Engholm k.t.p., kiuj tre amuzis min, sed ankaŭ la sciencaj verkoj, inter kiuj mi volas speciale mencii *Retoriko*, de nia eminenta kaj tre simpatia profesoro Lapenna, pro la fakto, ke tiu ĉi libro kaj ankaŭ ĝia aŭtoro kulpas se mi nun tendas vin per ĉi tiu babilado, ĉar efektive estas ili, kiuj instigis min ekzerci miajn oratorajn kapablojn jam de mia knabaĝo.

Multaj geesperantistoj dum la jaroj vizitis mian hejmon, kaj mi kolektis iliajn subskribojn en albumon, kiun mi ankoraŭ konservas : mi povis flue interparoli kun ili, trovis ilin simpatiaj, kaj mi ĉiam pli kaj pli ŝatis kaj amis Esperanton kaj la Esperantomovadon. Dum la lasta militperiodo fremdaj soldatoj venis en mian urbon;

* Nun ne akirebla.

inter ili estis kelkaj Esperantistoj : ili venis viziti mian familion, parolis kun mi, kaj mi rimarkis aferon vere eksterordinaran : mi ne rigardis ilin, kiel fremdajn konkerantojn de mia lando, sed nur kiel simpatiajn samideanojn : antaŭ la uniformo mi vidis la verdan stelon.

Do mi kredas, ke mi jam diris sufiĉe : Esperanto estas por mi io, kiun mi nenial rezignus, kaj de tiu sento ekĝermis en mi la certeco, ke ankaŭ por la tuta homaro ĝi estas ne nur bona kaj interesa, sed necesa afero ; kaj eĉ pli ol la lingvo mem estas necesa ĝia interna ideo, kiu prave estis nomata "esperantismo". Iuj diras, ke Esperanto estas nur lingvo ; sed konstatinte, ke, preter mia konscio, mi sentis kaj sentas min amiko de ĉiuj gesamideanoj, mi ne povas ne aserti, ke la interna ideo ne nur ekzistas, sed estas la vera animo de la lingvo. Kaj rimarkinte, ke, kiel Esperantistojn, mi amis eĉ fremdajn militantajn soldatojn, mi devas konkludi, ke la interna ideo havas tian forton, kian D-ro Zamenhof mem ne povis imagi.

Do, kial mi batalas por Esperanto ? Ĉar mi preskaŭ suĉis ĝin kun la patrina lakto, tiel, ke ĝi fariĝis esenca parto de mi mem ; ĉar al ĝi estas ligitaj multaj el la plej dolĉaj rememoroj de miaj infanaj jaroj ; ĉar miaj gepatroj laboras por ĝi ; ĉar al ĝi dediĉas siajn tempon kaj fortojn multegaj homoj en la tuta mondo ; ĉar per ĝi mi povis ekkoni tiajn idealistojn ; ĉar ĝi plilarĝigis mian horizonton kaj donis unu plian noblan celon al mia vivo ; fine ĉar mi estas certa, ke Esperanto, tiel simpla, neŭtrala, egala por ĉiuj, la Esperantistoj, popolo senĉese batalanta por tia egaleco, la Esperantismo, tiel nobla amo al la tuta homaro estas benitaj kaj konstante benataj de la superaj fortoj ĉielaj.

ORATORIA KONKURSO

La rolo de Esperanto por la internacia proksimigo de la junularo

La Estraro de U.E.A. decidis, ke la temo de la Oratora Konkurso de U.E.A. por la jaro 1953 estu : La rolo de Esperanto por la internacia proksimigo de la junularo.

La konkurso okazos dum la Universala Kongreso en Zagreb kaj ĝin rajtas partopreni gejunuloj ĝis 28-jaraj. Laŭ la regularo pri la Oratora Konkurso, la paroladetoj daŭras proksimume 10-15 minutojn kaj la konkursantoj devas libere paroli, sed ili povas utiligi notojn. La konkursantoj anoncu sin plej malfrue ĝis la tago de la komenciĝo de la Kongreso al la Loka Kongresa Komitato, Amruŝeva ul. 5/I, Zagreb.

Pri la gajnintoj de la konkurso decidis speciala komisiono, nomota de la Estraro dum la Kongreso. La premioj estas : diplomoj kaj libro-premioj. Institucioj aŭ personoj, kiuj deziras doni pliajn premiojn por la Oratora Konkurso bonvolu informi pri tio la LKK-n.

La Estraro de U.E.A. esprimas sian varman deziron, ke kiom eble plej multaj gejunuloj el diversaj landoj partoprenu tiun konkurson, kiu ĝis nun ĉiam vekis grandan interesiĝon ĉe la kongresanoj.

ESPERANTO

Tole-binditaj volumoj

- 1951 Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p. afr.
al aliaj 10ŝ. 6p.
- 1952 Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p. afr.
al aliaj 10ŝ. 6p.

Mendu ĉe U.E.A.

Notu, ke ni sendas volumojn po 5ŝ. 6p.
NUR rekte al la koncernaj MA.

George Herbert : 1593-1633.

Disciplino

*Foru vergo via,
foru la kolero ;
Dio mia,
regu malsevero.*

*Mia kor' deziras
kun vi vol-identon ;
mi aspiras
plenan kor-kunsenton.*

*Ĉion nur post kribro
mi konfesas mia,
laŭ la libro,
sole Libro via.*

*Kvankam mi en ploro
kaj malvenko iras,
mia koro
al Di-tron' aspiras.*

*Velku do kolero,
amo plensufiĉos ;
pro l' ofero
ŝtona kor' moliĝos.*

*Sin rapide movas
amo batalperta ;
trafi povas
ĝi per pafo lerta.*

*Ne por mi evito ;
ĉar, venkinte vin,
amspirito
certe venkos min.*

*Foru vergo via ;
kvankam pekaso tero,
Dio mia,
foru la kolero.*

tradukis J. S. Dinwoodie.

C. Day Lewis :

La Duobla Vizio

*La rivero en tiu ĉi posttagmez' novembra
restas en ekvilibro de nubo kaj de suno :
ĝian fluadon brila obskur' kaj sombra
lumo
tombvestas. Ĉio ŝajnas trankvila kaj
samtembra.*

*Siamĝemele kunas realo kaj kopio :
salikojn la sozioj rekreas. Ĉevalino
bruna sian figuron trinkas. Ne
estas limo
kie solido ĉesas, estiĝas iluzio.*

*La idealajn memojn ni apud la rivero
kontemplas, ĉi kristal-aŭguratajn kaj
muarajn :
ni ilin alsopiras, ĉar ĉi ciferojn karajn,
ni scias, ventsuspiro forviŝos de l' kajero.*

*Ne pro pasem' ilia mi timas, sed pro
l' penso,
ke etendiĝas amoj plimultaj de la homo
ĝis nerealo—el la fakta pro bildfantomo
kiun ĝi mem generis, dreniĝas la esenco.*

*Instruu do, duobla vizi' de l' aŭtunfluo,
toleri la fandiĝon, difuzon de l' pasio !
Plej puraj akvogemoj de pura iluzio :
responde miajn radiojn fariĝu
tem-unuo !*

el la volumo "Poems 1943-47"
kun afabla permeso de la
aŭtoro kaj de la eldonintoj :
Jonathan Cape Ltd., Londono,
tradukis : W. Auld.

obskura : malluma
sombra : melankolie malhela
sozio : vizaĝsimilulo
kontempli : rigardi medite

John Lehmann :

Penetri tiun ĉambron

*Penetri tiun ĉambron mi deziras,
la mensmansardon, kiu ĉe ekstremo
de l' lasta koridoro sin ekzilas.
Verkante, mi atingas. Fraz', poemo,
aŭ (sed ne tiom certe) am' ŝlosilas.
Fajr' varmas, kaj la fina ver' tieas
sur kestofundo. Foje mi aliras,
sed vojeraras, ĉar la lum' paneas.
Se mi ŝlosilon taŭgan trovas foje,
malfermas iom—nepre sonas tiam
alarmo, iu vokas, "Fajron!" krias,
min bremsas nevidintan kaj senscian :
kaj mi rekuras laŭ l' ŝtupar' malĝoje.*

Kun afabla permeso de la aŭtoro
tradukis : W. Auld.

Heinrich Heine :

Mi amas vin sen lim'

*Mi amas vin sen lim', sen fin',
Kaj se disfalus nun la mondo,
Leviĝus el la mondruin'
Am' mia kiel flama ondo.*


*Aminte vin ĝis mortospir',
Eĉ en eterna tombofundo
En mia koro sangos ŝir'
De mia granda amovundo.*

tradukis Lucien Laurat.

Bernhard Zenker :

La papilio

*Eta papilo flirtas ĉirkaŭ flor',
Kisas ĝin petole, frandas, flugas for.
Flugas al la dua, kisas ankaŭ ĝin ;
Multajn ĝi karesas, sen mezur', sen fin'.
Sed la floroj ploras forlasitaj nun ;
Ilin ne konsolas ora bril' de l' sun'.
Ili velkas, mortas pro trompita sent'—
Eta papilo flirtas plu en vent'.*



John Francis
anstataŭas la bildon sur p. 55 de la
februara numero

Donacoj al CED

	£	ŝ.	p.
Stato la 7-an de Februaro 1953	80	10	6
Sveda Esperanto-Federacio ..	34	2	10
D-ro Halbedl, Aŭstrujo ..		12	8
Ernest G. Dodge, Usono ..	3	10	11
S-ro R. Lecocq, Francujo ..		10	0
Leicester Esp.-Grupo, Anglujo ..		10	0
F-ino E. Baldwin-Smith, Anglujo	1	1	0
S-ro C. N. Ayres, Usono ..		12	9
Milana Esp.-Grupo, Italujo ..	1	8	6
Nov-Zelanda Esperanto-Asocio	5	0	0
S-ro L. Minnaja, Italujo ..	1	0	0
D-ro S. Liebeck, Sud-Afriko ..	5	0	0
	£133	19	2

Donacojn por CED oni povas sendi
al UEA en Heronsgate, Rickmans-
worth, Herts., Anglujo, aŭ al Unuiĝo
Esperantista Franca, 34 Rue de
Chabrol, Paris 10, Francujo, aŭ al la
Centro mem.

Helpu al U.E.A. per la varbo
de viaj Esperantistaj amikoj.
Ni sendos al ili specimenan
ekzempleron de la gazeto se vi
sendos la adresojn.

Lamond :

La elementoj kiuj karakterizas bonan Esperanto-stilon

LA du ĉefaj elementoj de bona stilo estas komunaj al ĉiuj lingvoj. Unue, oni ne nomas bonstila verkmanieron kiu ne montras ian originalecon. La temo mem povas esti tre konata. En la verkoj de la glora Shakespeare malnovaj temoj ofte aperas. Sed ili aperas en originalaj vestoj kiuj donas al ili la ĉarmon de io tute nova. Due, por meriti ke oni rigardu lin kiel stiliston la verkanto devas krei la efikon kiun li intencis. Tion li kapablas nur se li precizigas al si iun celotan efikon kaj scias ĝin atingi per uzo de plej konvena lingvo. Plue, ne sufiĉas bone difini la celon kaj plene atingi ĝin : se la celo estas triviala aŭ banala, la rezultato ne povas esti vere bonstila.

Inter la subordaj ecoj de bonstila lingvo troviĝas jenaj : kompreneblo, simplo, vortŝparo, harmonio, kaj en Esperanta verkado internacieco. Figura lingvo ofte faras tre plaĉan impreson, precipe en poemoj, sed pri Esperantoverkoj nur kondiĉe ke ĝi estu internacie komprenebla. Kiu volas atingi bonan stilon bezonas atentege verki por eviti gramatikajn erarojn kaj incitajn apartaĵojn.

Tial ke bona stilo konsistas el feliĉa vortaranĝo, vortoj meritas apartan konsideron. Verkanton kiu senzorge uzas vortojn oni ne povas estimi. Vortoj devas esti uzataj laŭ sia ĝusta senco, kaj tiamaniere ke ili ekzakte esprimas ideojn. Ĉe verkado en Esperanto oni devus preskaŭ ĉiam elekti oficialajn aŭ vaste aprobitajn radikojn ; nur tute apartaj cirkonstancoj pravigas enkondukon de neologismo aŭ nacilingva vorto.

Esperanto posedas iom malgrandan radikaron. Pro tio estas nature fari al si kunmetaĵojn ; cetere kunmetaĵoj dotas stilon per energio kaj koncizo. Sed la kunmetaĵoj ne estu pezaj, malbelaj, kontraŭlogikaj aŭ cerbumigaj. La verkanto evitu trouzon de vortoj longaj. Plej bone estas kutime elekti mallongajn vortojn, sed uzi longajn nur por atingi specialan efikon. Lingvo-diverso estas per ĉiuj rimedoj celinda ; tiurilate necesas sin gardi kontraŭ la sibleco de Esperanto. La sufikso “um” kaj la prepozicio “je”, pro sia nedifiniteco, devus esti uzataj kiel eble plej malmulte.

Ankaŭ bona konstruo de frazoj kaj paragrafoj multe kontribuas al stilo. Sukcesdona metodo estas plejofte aranĝi vortojn laŭ iu natura ordo—ekzemple, subjekto-verbo-komplemento, kaj adverbo-verbo. Tion farante, la verkanto povas laŭvole naski efekton per nura rompo de sia regulo. Kiel ĉe elekto de vortoj, tiel same ĉe konstruo de frazoj, diverso multe valoras. Ofte ripetataj grupoj, kiaj, adjektivo + substantivo kaj adverbo + verbo tudas la leganton. Pli-malpli egale lin tudas trovi samrolan vorton regule starante ĉe la komenco de frazoj. Alia grava afero estas diferencigi frazojn laŭ longo. Krom en kelkaj cirkonstancoj, serio de mallongaj frazoj aŭ—eĉ pli—serio de longaj frazoj malagrabla impresas ; kaj plej malagrabla impresas senrompa enfluo de tre longaj kaj tre komplikitaj frazoj. Ankaŭ paragrafojn oni devus diversigi laŭ longo. Nepre evitotaj estas tiuj kvazaŭ senfinaj

fino sur paĝo 139

Ota Ginz :

Ceĥo en Islando

EN komenco de la deksepa jarcento ĉeĥo vizitis la insulon Islando kaj li verkis pri sia vojaĝo libron. Ĝia enhavo superas ĉion, kio estis skribita en tiu tempo de neskandinavaj popoloj pri tiu insulo.

Estas la verko *Islandia*, de Daniel Vetter.

Unue pri la aŭtoro :

Daniel Strejc, kiu uzis en eksterlando la nomon Vetter, estis filo de Jiří Strejc, en sia ĉeĥa patrujo konata verkisto kaj tradukisto Bohemfrata (Unuiĝo de Bohemaj Fratoj, fondita en 1467). Li naskiĝis en la jaro 1592 en Hranice, urbo kuŝanta en Moravio, unu el la ĉeĥaj landoj. Kune kun aliaj membroj de tiu persekutita eklezio fuĝis Vetter en fremdlandon. En Heidelberg li instruis ĉeĥan lingvon al Frederiko Henriko, plej aĝa filo de Frederiko de Pfalz, la t.n. "vintra reĝo" bohemia. Poste li studis en la nederlanda Leyden, de kie li en la jaro 1613 entreprenis sian vojaĝon al Islando. La urbo Leszno en Polujo estis tiam grava centro de ĉeĥaj ekzilitoj pro religia konvinko. Tien venis ankaŭ Daniel Vetter kaj li edziĝis tie kun Kristina Poniatowska, adoptita filino de Jan Amos Komensky. El leteroj de Komensky oni scias, ke Vetter estis en la jaro 1663 alta funkciulo (konsenioro) de Bohemaj Fratoj en la pola loko Brzeg. Tien li foriris post detruo de Leszno, okazinta en 1656 dum la pola-sveda milito. La lasta informo, kiun ni havas pri la vivo de la aŭtoro, estas el la jaro 1669 en unu letero de Komensky.

La verko *Islandia* de Daniel Vetter estas konata sole en kvar ekzempleroj :

Ĉeĥa manuskripto en la jaro 1638 (kun verŝajne erara noto "1632"), pola eldono, presita en Leszno 1638, germana eldono, aperinta en Sagan, kaj la ĉeĥa eldono, presita en la jaro 1673 en Praha. Estas eble, ke la ĉeĥa teksto aperis presite jam en la jaro 1638, sed oni ne trovis ĝis nun eĉ unu ekzempleron de tiu libro.

De eksterlandaj fakuloj estis prilaboritaj la eldonoj pola kaj germana. Ne estas ĝenerale konata la ĉeĥa teksto, kiu enhavas iujn novajn, parte gravajn faktojn.

La titolo de la ĉeĥa libro, kiun preparis la aŭtoro en sia lingvo gepatra laŭ speciala peto de siaj samlandanoj, estas :

Islandia, aŭ Mallonga priskribo de insulo Islando, en kiu estas laŭvere notitaj aferoj strangaj kaj eksterordinaraj, en tiuj ĉi niaj regionoj ne vidataj, tie propraokule viditaj kaj iuj de fidindaj insulaj loĝantoj aŭskultitaj. Por ĉiuj veraj kristanoj, dezirantaj rigardi la Diajn farojn kaj aŭskulti pri ili, denove al lumo eldonita. Verkita de Daniel Vetter kaj presita en Praha de Daniel Michálek 1673.

La libro enhavas Dediĉon, Enkondukon kaj la sekvantajn ĉapitrojn : Nomo de la insulo, Religio, Administro, Pri maniero de tagoj kaj noktoj, Montoj, Akvoj, Pri bestoj islandaj, Pri birdaro, Vojoj en Islando, Metioj, Domoj, Vivmaniero, Insuloj ĉirkaŭ Islando, Fiŝoj kaj maraj monstroj.

Vetter dediĉas la verkon al tri nobeloj, al li amikaj kaj li parolas en la Dediĉo : " . . . La homoj estas limigitaj koncerne lokon, ili ne estas

ĉiosciaj kaj ne povas ĉeesti ĉion kaj ĉiuloke, ili ne povas ĉion kaj ĉie vidi. Sole Dio konas sin mem kaj ĉiujn siajn farojn perfekte kaj estas pri ili konscia. Tamen, li kaŝis siajn farojn antaŭ neniuj. Ĉiu, li estu ie ajn kaj iu ajn kaj egale en kiu patrujo, havas antaŭ siaj okuloj abunde da Diaj faroj, kiujn li povas rigardi kaj pri kiuj li povas pie kaj savodone mediti. Kaj precipe, se iu ekiris ien pli malproksimen el sia patrujo al fremdaj regionoj kaj reĝolandoj, tiam li tie kompreneble povas ekvidi la diversecon, la grandecon kaj la multecon de tiaj faroj. Li certe vidos, kiel Dio iujn regionojn bonvolis fari gajaj, belaj, noblaj, fruktodonaj kaj abundantaj per ĉio bona: animaletoj, hejmbestetoj, birdoj, fiŝoj belaj, bonaj kaj utilaj al homa ĝuo. Kontraŭe li vidos ankaŭ, kiel aliaj regionoj estas dezertaj, rokaj, marĉaj, polvaj, malvarmaj, malfekundaj kaj diversmaniere negajaj, malagrablaj kaj malkomfortaj, bestaro en ili sovaĝa, birdaro kaj fiŝoj grandparte rabaj, teruraj kaj absolute netaŭgaj por homa manĝo. Malgraŭ tio tamen eĉ en tiuj ĉi regionoj Dio homojn havas, nutras kaj prizorgas. Ili posedas nek vinon, nek oleon, nek mielon, nek iun ajn kuiradon, sed tamen ili estas vivaj, sanaj kaj atingas grandajn kaj multajn jarojn. Kaj unu el tiuj lokoj estas Islando, insulo kuŝanta alte en la Meznokto, kiun mi sukcesis ne sole vidi, sed eĉ traveturi tra ĝia ne malgranda parto . . . ”

Por la nuntempo la aŭtoro montriĝas certe iom naiva. Jen lia rakonto pri balenoj: “Precipe kaj krom aferoj aliaj indas la rigardon balenoj, da kiuj estas tie granda nombro, kaj ili estas grandaj kaj supermezure teruraj. Ili kun forta sono kaj bruo promenas en la maro,

plejparte duope, iam ankaŭ po tri kaj ili ofte alvenas al la ŝipoj kaj naĝas laŭlonge de ili, kaj elŝovante la dorson kaj duonan okulon el la akvo, ili diligente observas la ŝipon kaj la homojn. Ili ne malhelpas la ŝipon, se oni al ili ne donas ian kaŭzon. Alimaniere estus malbone, se oni ilin per io incitus kaj al kolero instigus. Tial dum tiu tempo oni devas ĉesigi la kriadon kaj kompreneble la pafadon, oni klopodas ekplaĉi al ili per diversmaniere belaj kaj flataj vortoj”. Vetter esprimas sin pri iuj maraj monstroj, kiuj montriĝas al la homoj, ke “ili estas supermezure teruraj kaj ofte tiuj, kiuj ilin rigardas, pro teruro apenaŭ restas vivaj”, sed li ne daŭrigas, motivante prudente: “Unue, dum la mallonga tempo ne estis eble ĉion en perfekte rigardi kaj tial—se oni devus priskribi ion nekomplete kaj kompreneble erare—oni prefere ĉesas pri tio kaj oni kontentiĝu pri aferoj jam menciitaj”.

La libro atestas, ke Vetter estis inteligenta homo, kiu sciis observi kaj priskribi la observaĵon. Li estis ankaŭ klera; laŭ lia verko evidentiĝas, ke li studis preskaŭ ĉiujn tiutempe atingeblajn verkojn pri Islando. Parte li el ili ankaŭ ĉerpis kaj bedaŭrinde akceptis ankaŭ iujn el iliaj eraroj. La verko de Vetter enhavas tamen relative malmulton de tiutempe oftaj sensencaĵoj pri mirakloj, monstroj k.s. Parton de liaj malekzaktaĵoj oni povas klarigi per tio, ke li verkis la libron 25 jarojn post sia vojaĝo. Forgeso aŭ senintenca eraro estis do ebla.

Daniel Vetter, akompanata de Jan Salmon, pastro de Bohemaj Fratoj, ekveturis el Bremen la 16an de majo 1613 kaj la 7an de junio li atingis la insulon. Ilia ŝipo ekankris en la golfo Nesvogur en orienta parto

de la insulo.

La loĝantoj de la insulo traktis la vojaĝantojn amike. Post ilia alveno akceptis ilin plej afable la distriktestro Jón Sigurdsson. Li zorgis pri ili, donis ĉevalojn kaj kondukis ilin kun si al la Islanda parlamento Althing. La aŭtoro plendas sole pri la tiam ricevita nekutima manĝo kaj trinko—seka moruo kun multjara butero, selakto—kaj pri la pena vojaĝo tra marĉoj, trans montoj rokaj kaj iam fumantaj.

Dum la kunveno de la parlamento akceptis ilin Herluf Daal, prefekto de la insulo, delegita tien de la Dana reĝo. Kiam li informiĝis pri la nacio de la du fremduloj kaj pri la celo de ilia vojaĝo, li bonvenigis ilin kaj petis, ke ili dum sia restado ĉe Althing estu liaj gastoj kaj venadu manĝi kun li en lian tendon. Vetter pruvis al la prefekto “per dokumentoj de famaj kaj kleraj viroj” la motivon de sia vizito, sed en la libro mem li nenion klarigas. Restas do nekonate, kial la du ĉeĥoj veturis al la fora insulo.

En Althing amikiĝis la Bohemaj Fratoj kun la episkopo Oddur Einarsson. Li invitis ilin al sia sidejo Skálholt kaj tie ili restis dum kvar tagnoktoj. Kiam ili sin preparis al foriro, li aranĝis por ili adiaŭan festenon, kiun partoprenis lia tuta familio kaj iliaj amikoj el la ĉirkaŭo. Kvankam mem neriĉa, la episkopo insistis, ke la ĉeĥoj akceptu liajn donacojn: 20 metrojn da *vadmál*, speciala drapo islanda, kaj du parojn da kuleroj, unu faritan el virŝafa korno, la alian el balena osto. Ili ricevis krome sufiĉan provizon por sia plua vojaĝo, ĉevalojn kun gvidisto kaj rekomendan leteron al la prefekto Herluf Daal, ke li zorgu pri ilia hejmeniro.

Kaj ili denove devis veturi “trans

teruraj montoj, rokoj kaj marĉoj, samè kiel tra grandaj akvoj kaj ofte kun granda danĝero” al la marbordo, kie en la reĝa kastelo de Bessastadir ilin akceptis ĝentile la prefekto. Li prizorgis por ili ankaŭ ŝipon por reveturo el Hafnarfjördur kaj pagis al la ŝipestro la kostojn. En delikata maniero li nenion menciis al Vetter pri la farita pago.

La ĉeĥaj vojaĝantoj revenis al Hamburg post 9-11 semajnoj, kalkulante de ilia foriro el Bremen.

Inter malnovaj ĉeĥaj vojaĝlibroj estas la *Islandia* de Daniel Vetter unu el la plej interesaj.

Esperanto-stilo (de paĝo 136)

paragrafoj kiuj mallogas, timigas la okulon.

Ĉio ĉi estas nur priskriba, analiza. Ĉu ne ekzistas iaj modeloj? Certe jes! En la Esperanta literaturo aparte honora loko estas okupita de la brila triopo: Zamenhof, Grabowski kaj Kabe. Tiuj tri klasikuloj liveras normojn laŭ kiuj juĝi la ceterajn verkistojn, kun la ebla escepto de la plej talentaj el ili. Ĉar alte talenta verkisto ne bezonas modelojn. Lia genio kreas propran, memstaran stilon.

HELSINGÖR

Internaciaj FERIAJ E-kursoj

18-25 de julio


Konversacia kurso, prepara kurso por Cseh-metodaj geinstruontoj. Daŭriga kurso, k.t.p.

Unu semajno inter centoj da gesamideanoj el 10-15 diversaj landoj. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,

Ingemannsvej 9,

Aabyhøj, Danlando.



Vivo Virina

Gvidantino de ĉi tiu rubriko estas: S-ino E. Rapley, Esperanto House, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo, al kiu oni adresu ĉiujn korespondaĵojn pri *Vivo Virina*.

Kiu volas respondon, nepre sendu rpk. (Britoj pm.) por afranko.

La religia vivo en Indonezio

El la tri religioj—Mohametana, Kristana kaj Budhana—kiuj estas kutimaj en Indonezio, la Mohametana havas plej multajn adeptojn. La popolo estas tre pia, kaj la infano ricevas sian unuan instruadon pri religio en la hejmo, kie la patrino gvidas la infanon al ekstudo kaj lego de la Korano. Ili lernas ankaŭ preĝi, kiel ĉiuj Mohametanoj, kvin fojojn en ĉiu tago; ankaŭ tiam lavi la tutan korpon, kio, parenteze, tre bone influas la homan sanon.

Oni devas neniam trinki alkoholaĵon, nek manĝi porkan viandon. Dum unu monato en ĉiu jaro la Mohametanoj fastas, kaj dum tiu tempo oni nenion rajtas manĝi, trinki kaj fumi de la kvara horo ĝis la dek oka horo. Ankaŭ ĉi tion oni opinias saniga, ĉar ĝi donas al la digesto ripozon. Plie, per tio ĉiuj homoj povas sperti la malsaton de la malriĉuloj kaj lerni la sinregon.

Dum religiaj festoj la infanoj kaj virinoj dancas, kaj tiuj dancoj posedas religian signifon. Eĉ okjara knabineto scias bele kaj elegante danci.

La Indonezia virino estas la centro de la familio, ĉar ŝi naskas la infanojn. Estas tre grava afero en Indonezio ke oni havu infanojn, kaj tre feliĉiga al la gepatroj.

Sed ne nur kiel edzino kaj patrino la virino ludas gravan rolon. Ŝi havas

la rajton voĉdoni kaj sidi en la Parlamento. Ĉiuj la lernejoj akceptas knabinojn samrajte kiel knabojn, kaj en la komerco la virino montras sian kutiman plilertecon super la viro!

Kaj fine, kial ne provi bonan manĝon Indonezian? Jen kiel kuiri frititan rizon:

Ingrediencoj—kuirita rizo; viando; papriko; cepoj; du ovojn; iom da butero; salo.

Oni pecigu la viandon, paprikon kaj cepojn, kaj fritu ilin en la butero. Kiam ili estas plenkuiritaj, oni enmetu la rizon kaj la salon. Kirlu kaj fritu, kaj post mallonga tempo enmetu la du ovojn kaj kirlu ĝis plenkuiri.

Laŭ informoj de Ch. Sj. Datoe Toemenggoeng.

INFANOJ KAJ PATRINOJ


Dorothy Canfield Fisher

Trad. T. J. GUERITTE

175 paĝoj, bind. 5ŝ. afranko 6p.

La pensoj de moderna Usona patrino.

Mendu ĉe U.E.A.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso—kutime 1 horon.
Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	21.45–22.15	Valencia. 43m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 288m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.40–07.45	Lille. 218m. I. Prof. Labit, 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	23.05–23.20	Zagreb. 264.7m. I. Ekde Aprilo 16.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur 17-IV). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum Nederlando.

Hispana Radio. Krom la ĉi-supre indikitaj programoj de la stacioj Madrid kaj Valencia, niaj hispanaj samideanoj regule parolas en sia nacia lingvo pri Esperanto :


1. per la stacio Tarragona, 208m., ĉiun ĵaŭdon de 19.00 ĝis 19.15. (Provizore ekde la komenco de Marto la elsendo okazos nur la trian ĵaŭdon de ĉiu monato). Parolas S-ro Güell Socias pri Esperantaj novaĵoj kaj diversaj okazintaĵoj, kun resumo en Esperanto.

2. per la stacio Manresa, 201m., ĉiun ĵaŭdon de 19.15 ĝis 19.30, simila programo de la Esperanta Fakto de Lingua Club, prezentita de S-ro Saumel Vila.

Bedaŭrinde ĉi tiuj stacioj havas nur malfortan sendopovon kaj lokan aŭdeblecon.

El Jugoslavujo ni ricevis ekzempleron de la Zagreba ĵurnalo *Narodni List*, en kiu estas publikigita en Esperanto la ĉi-supra programo. Estas aldonitaj en nacia lingvo informoj pri la venonta kongreso. Dankon kaj gratulon !

Elsendoj el Zagreb okazos laŭ la supra programo, kredeble ekde la 16a de Aprilo.



Enigma Konkurso N-ro 77

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkuponon internacia.

Solvoj.

N-ro 170 : Sia estas kara pli ol najbara.

N-ro 171 : Trafi DE Scilo al Haribdo. Malplena sako puŝas al PEKO. Ne donu KAJ ne boju. Fremda MIZERO, ridinda afero. Tempo ESTAS mono. Koro tro PLENA, buŝo parolas. Estas tubero en LA afero. El aero al TERO.

N-ro 172 : Kiu groŝon ne honoras, eĉ duongroŝon ne valoras. Ŝlosilo uzata ruston ne konas.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 73-a konkurso : S-ro R. Laine (Franc.) 156, S-ro Fr. Couwenberg (Belg.) 151), S-ino N. Koudijs-Modoo (Ned.) 148p.

Enigmo N-ro 176 : Bonvolu serĉi 25 sesliterajn vortojn laŭ la ĉi-subaj klarigoj, kaj faru poste de tiuj vortoj anagramojn, kies komencliteroj formas proverbon. 1. Linio limiganta geometrian figuron. 2. Samrangulo. 3. Speco de mantelo por maskobalo. 4. Stilo de meblaro. 5. Varmigi fluaĵon. 6. Teatra danco. 7. Konduki aŭtomobilon. 8. Malobeema. 9. Rajto pri justa rekompenco. 10. Speco de hispana ŝafo. 11. Inflamo de la vejnaj parioj. 12. Ruĝa elkreskaĵo sur kapo de koko. 13. Opoziciis. 14. Kio estas nepre bezonata. 15. Fari imitotan objekton. 16. Turka sofo. 17. Malhelpi, ke iu faru ion. 18. Politika reĝimo, uzanta teruron kiel regadrimedon. 19. Voĉdono. 20. Longkrura birdo. 21. Laŭleĝa izoligo de

geedzoj. 22. Malgranda aro da kunigitaj objektoj. 23. Enira aperturo de la stomako. 24. Greno por griza faruno. 25. Centro, ĉefa punkto.

Enigmo N-ro 177 : Serĉu du seriojn de 24 diversaj substantivoj, la unuan konsistantan el sesliteraj vortoj, la duan el kvinliteraj vortoj. Tiuj vortoj devas havi po du kvin komunajn literojn. La sesaj literoj estu sinsekve tiuj de la proverbo : *tablo kovrita faras amikojn*, sed ili ne estu la unuaj literoj de la sesliteraj vortoj, kaj la vortoj el la du serioj po du komenciĝu per malsamaj literoj. Ekz. 3-aj vortoj povus esti : rabeno—areno. Ne uzu tiujn en la solvo.

Enigmo N-ro 178 : Ĉevalira enigmo. Formu el la literoj de tiu ĉi figuro du strofojn de originala esperanto-poemo kun la komencliteroj de la nomo de la poeto. La litero maldekstre supre estas la komenclitero.

E	D	K	N	B	O	O	K	S	O.	A
A	A	B	N	N	O	U	K	L	I	N
U	N	K	A	O	S	I	U	D	N	R
S	J	I	I	S	L	J	E	M	O	M
B	K	I	O	N	M	L	E	M	O	G
B	T	T	N	A	G	A	E	N	A	L
U	O	R	N	S	N	E	A	P	I	K
E	A	U	N	A	D	R	H	S	A	O!
N	N	O	P	A	A	I	R	S	A	S
T	L	E	K	L		N	A	A	R	T
I	A	L	H	N		E	T	O	A	I
O,	A	U	S	C	O!	R	L	L	A	O
H	N,	N,	A	O	K	G	K	E	N	L
L	E	J	D	A,	A	L	U	T	H	B
K	O	M	I	Z.	L	T	L	S	S	S
N	E	N	A	S	M	K	E	T	A	A
R!	O	V	E,	O	K	A	I	O!	A	I
M	F	E	I	S	L	C	Ŭ	L	Ĉ	L
M	N	E	E	N	A	A	I	U	D	T

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 248

4-an de Marto 1953

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Februaro, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1952 :

	1952	1953
Asociaj membroj	2744	2792
Individuaj membroj :		
MJ 503		487
MA 2766		2782
MS 354		444
Patronoj .. 8		6
DM 256		259
HM 57		58
	3944	4036
	6688	6828

DELEGITOJ

Aŭstralio

Ballarat (Victoria). D : K. Podenas, 109 Hickman Street.

Britujo

Leicester. FD (Vegetarismo) : D. S. Broughton, 18 Deepdale.

London, N.22. VD : vakas.

Newcastle-on-Tyne. D : vakas.
VD : S-ino L. E. Cant, Highfield, Hexham Road, Heddon on the Wall.

Egiptujo

Alexandria. FD (Astronomio) : Atalla Hanna, Rua Cassinis 88, Sporting Club, Hadra Baharia.

Kena. D : Anis Ghattas, Bandar Kena.
FD (Korespondado) : La D.

Finnlando

Lappeenranta. FD (Oficistaj aferoj) : H. Rätty, Valtakatu 26. Tel : 1270.

Francujo

Chelles (S. et M.). D : M. Fabert, 42 rue Lucien Gallet, Cité Château-Gaillard.

Paris. FD (Pacifismo) : J. L. Texier, 278 Ave. Daumesnil, Paris 12.

Taverny (S. et O.). D : L. Giot, 24 rue Octave Dubois. Tel : St. Leu-la-Forêt 403.

Germanujo

Bad Hersfeld. D : R. Hirsch, Wallengasse 20-II.

Hochheim/Main. D : J. Deneffe, Frankfurterstrasse 4.

Hispanujo

Badalona. D : F. Garcia Hurtado, Cruz 70—II—2a.

FD (Poŝto) : La D.

Ciano Santa Ana (Oviedo). D : A. González-Meana, La Oscura.

Gijón. D : A. Menéndez-González, Trinidad 33-2. Tel : 3597.

Madrid. FD (Statistiko matematika) : F. Azorin, Federico Rubio 90. Tel : 34.29.99.

Maroko

Khémisset. D : André Carlouz, Rue du Contrôle.

Nederlando

Oosterland. D : portempe vakas pro la inundo.

Nigerio

Ikorodu. D : vakas.

Lagos. D : P. Ogwuazor, Public Relations Dept.

Norvegujo

Hamar. D : J. A. Kleven, Disen alle 11. Tel : 2038.

Sarpsborg. D : J. H. Rosbach, Karl Johans gt. 10.
FD (Lingvoj) : La D.

Nov-Zelando

Auckland. D : C. W. Brandon, 16 Wairiki Road, Mt. Eden, S.1. Tel : 61-183.

Cambridge. D : vakas.

Hamilton. D : vakas.

Wellington. D : vakas.

Svedujo

Jönköping. FD (Turismo) : S-ino M. Jensie, Brahegatan 65. Tel : 13309.

Karlskoga. FD (Turismo) : S. Herlufsen, Värmlandsvägen 14. Tel : 31783.

Norrköping. FD (Instruado) : S-ino E. Tibbling, S. Nygatan 7a. Tel : 24807.

Tullinge. D : E. R. Stridell, Wästfeltsvägen 8. Tel : Stockholm 980512.

Svislando

Baden. D kaj FD : vakas.

Venezuelo

Peranto. Lino Moulines, Real de Sabana Grande 102. Tel : 29340.

PATRONOJ 1953

6. Ravestein-Basters, S-ino J. M., Den Haag, Nederlando

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1953

372. Rydén, F-ino E., Lärje, Svedujo
 373. Barkhausen, S-ro H., Bremen, Germanujo
 374. Engler, F-ino M., Mainz, Germanujo
 375. Hauber, S-ro R., Bad Aibling, Germanujo
 376. Haus, S-ro J., Düsseldorf, Germanujo
 377. Jacobs, F-ino E., Flensburg, Germanujo
 378. Klefe, S-ro G. F., Lübeck, Germanujo
 379. Lamprecht, D-ro H., Essen, Germanujo
 380. Schulz, S-ro P., Gelsenkirchen, Germanujo
 381. Wittbrodt, S-ro W., Berlin, Germanujo
 382. de Nerini, S-ino M., Maracaibo, Venezuelo
 383. Farrell, Pastro, Great Harwood, Anglujo
 384. Hill, S-ro A., Birmingham, Anglujo
 385. Hoyle, S-ro J., Manchester, Anglujo
 386. Knight, S-ino E. B., London, Anglujo
 387. Relf, S-ro E. F., Addlestone, Anglujo
 388. Turton, S-ro G. H. A., Huddersfield, Anglujo
 389. Tozer, S-ro W. G., London, Anglujo
 390. Del Valle, F-ino M. R., Rabat, Maroko
 391. Viltard, S-ino, Marrakech, Maroko
 392. Minnaja, S-ro L., Roma, Italujo
 393. Barbieri, Prof. P., Reggio Emilia, Italujo
 394. Symoens, S-ro E., Leopoldstad, Kongo
 395. Harlin, S-ro G., Spångenäs, Svedujo
 396. Malmgren, S-ro E., Stockholm, Svedujo
 397. Sexton, S-ro F. P., Surbiton, Anglujo
 398. Maier-Bevel, S-ino A. L., Vancouver, Kanado
 399. Biewer, S-ro J., Darmstadt, Germanujo
 400. Hering, S-ro A., Nürnberg, Germanujo
 401. Moura Pereira, S-ro F., Lobito, Angolo
 402. Whitworth, S-ro A., Thorold, Kanado
 403. Baur, D-ro A., Bern, Svislando
 404. Keramsi, F-ino L., Meknés, Maroko
 405. Doneis, S-ro A. F., Pharr, Texas, Usono
 406. Neukomm, S-ro J., Casablanca, Maroko
 407. Fraser, F-ino R. G. M., Ilford, Anglujo
 408. Millidge, Pastro R. G., Sutton, Anglujo
 409. Carrfors, S-ino S., Bromma, Svedujo
 410. Beliard, S-ro, Nantes, Francujo
 411. Fourniere, S-ino G., Longjumeau, Francujo
 412. Prud'hon, S-ro G., Fontenay-sous-Bois, Francujo
 413. Wagner, S-ro G. E., Tampa, Fla., Usono
 414. Iglesias, S-ro E., Buenos Aires, Argentino
 415. Musih, S-ro L., Buenos Aires, Argentino
 416. Gomez, S-ro F., Savigny-sur-Orge, Francujo

417. Hullin, S-ro, Honfleur, Francujo
 418. Lagarde, S-ro L., Paris, Francujo
 419. Ledanois, S-ro M., Clamart, Francujo
 420. Gaillard, S-ro A., Paris, Francujo
 421. Baker, S-ro C. A., Exeter, Anglujo
 422. Bevan, S-ro G., Wrexham, Kimrujo
 423. Lewin, S-ro M., Dunstable, Anglujo
 424. Costantini, S-ro L., Milano, Italujo
 425. Lenzi, S-ro R., Pisa, Italujo
 426. Viti, S-ro G., Messina, Italujo
 427. Lieber, S-ino D., Ain Harrouda, Maroko
 428. Vidal, S-ro J., Meknés, Maroko
 429. Jayet, F-ino E., Morges, Svislando
 430. Magarey, Pastrino M., Mitcham, Aŭstralio
 431. Holloway, S-ro J. F., Trentham, Nov-Zelando
 432. Geerlings-la-Croix, S-ino M. C., Amsterdam, Nederlando
 433. Luinge, S-ro G., Alkmaar, Nederlando
 434. Moutschka, S-ro F., Landskrona, Svedujo
 435. Samson, S-ro H., Ain Taoujdat, Maroko
 436. Fernández Alvarez, S-ro J., Oviedo, Hispanujo
 437. Petit, S-ro P., Rosny-sous-Bois, Francujo
 438. Fisher, S-ro A., Devonport, Tas., Aŭstralio
 439. Arton, S-ro A., Vollsjö, Svedujo
 440. Assarsson, F-ino A., Hälsingborg, Svedujo
 441. Tell, S-ro L., Stockholm, Svedujo
 442. Morris, S-ro W., Birmingham, Anglujo
 443. Sarfas, S-ro E. W., New Barnet, Anglujo
 444. Sinclair, F-ino P. C., Buckhaven, Skotlando
 445. De Boes, S-ro G., Gent, Belgujo
 446. Nygård, S-ro G. A., Göteborg, Svedujo

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : F. G. Rayer 10ŝ., A. Prince 10ŝ., S-ino L. A. Evans 5ŝ., W. Grice 2ŝ. 6p., J. A. Farmer 7ŝ. 6p., C. M. Houghton 10ŝ., A. M. Powell 10ŝ., W. Cunningham 5ŝ., E. P. Ockey 5ŝ., N. F. Goodwin 2ŝ. 6p., H. J. Bridger 80ŝ., E. McCanlis 2ŝ. 6p., G. L. Preedy 22ŝ. 6p., S-ino E. B. Knight 5ŝ., F. W. Hipsley 10ŝ., W. H. King 20ŝ., H. de Jong 2ŝ. 6p., F-ino H. Wolff 14ŝ., E. B. Johnson 20ŝ.

DONACOJ al la Propaganda Konto : R. C. Ashford 9ŝ., D-ro R. H. Crowley 60ŝ., Milana Esp. Grupo 28ŝ. 6p., N. G. Nilsson 34ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Tiam Judas, lia perfidinto, vidinte, ke li estas kondamnita, pentis, kaj reportis la tridek arĝentajn monerojn al la ĉefpastroj kaj la pliaĝuloj, dirante: Mi pekis, perfidante senkulpan sangon. *S-ta Mateo 27.3.*

Bournemouth ĝuinda feria urbo. Multaj homoj kiuj aliĝis la Britan Kongreson je Pentekosto ferios kaj ĝuos ankaŭ la post-kongresajn tagojn aranĝatajn. Bournemouth tre plaĉas al alilandanoj. Aliĝilo de W. Laurie, Hon. Sek., 6 Marlborough Road, Bournemouth, Anglujo.

Belga Fremdultrafika Servo, Konijnenperken 109, BOSVOORDE-BRUSSEL, Belgujo, rezervas hotelĉambrojn, dissendas turismajn prospektojn (1 rpk). Rekompencos pro publikigo.

Mi deziras aĉeti librojn en araba, persa kaj turka lingvoj. Mi povas uzi ĉiujn lernolibrojn, vortarojn (skribita ialingve) kaj literaturon. Bonvole skribu al S-do Wilfried H. Koehn, 1259 24th Street, SANTA MONICA, California, Usono.

Hispana samideano 17-jara deziras korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo por interŝanĝi poŝtkartojn kaj revuojn. Nepre respondos. Pedro Cantó, Joyas 13, MOYA (Barcelona), Hispanujo.

Nia unua letervespero okazos meze de Majo. Dudek geklubanoj, aĝo 14-25 jaroj, atendas viajn leterojn kaj poŝtkartojn. Esperanto-Grupo Moya, Str. Forn 19, MOYA (Barcelona), Hispanujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo. Sekretariejo: Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

Bildkartvesperon aranĝos Esperanto-grupo de Leksberg fine de Aprilo. Ni atendas danke multe da il. pk. el la tuta mondo, kaj certe respondos. Skribu al La Esperanto-Grupo, Box 8, LEKSBERG, Svedujo.

Internacia Kultura Semajno, 3-10 Aŭgusto 1953 en Kultura Esperanto-Domo, Grésillon. Informas detale kontraŭ internacia respondkupono G. Odent, Lycée de LAON, Aisne, Francujo. Represo petata.

22-jara oficisto deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj. Kurt Schmidt, Lesserstr. 48, HAMBURG-WANDSBEEK, Germanujo.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, decembra numero de "Espéranto et Culture" elĉerpiĝis. Mendu nun la majan numeron kun I.L.E.I. sekcio. Respondkupono necesa por unu, de S-ro Dumarquez, ANZIN ST. AUBIN, par Arras, P. de C., Francujo.


Kultura Esperanto-Domo akceptos laŭeble de junio ĝis septembro ĉiulandajn Esperantistojn. Eventuale iam ajn ankaŭ karavanojn. Informpeto sendota kun internacia respondkupono al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, BAUGE, M-et-L., Francujo. Represo petata.

Novaj geesperantistoj deziras korespondi. Indiku aĝon, preferojn. Skribu al S-ro Fouski, 22 rue Gauvin, ANGERS, M-et-L., Francujo.

Grupo de kursanoj deziras korespondi tutmonde. Skribu al S-ro E. Mertner, ENGESVANG, Danlando.

Francaj geinstruistoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Gaillard, CHATEAU-LARCHER, Vienne, Francujo.

Bildkarte korespondu tutmonde kun la malgrandaj insuloj norde de Skotlando: S-ro Alex S. Wylie, Community Centre, KIRKWALL, Orkney, Skotlando.



Nova Esperanto-sekcio entreprenis la laboron de la Spirita Scienco de Martinus. Skribaĵon ni sendas al la malnovaj adresoj; sed ĉar verŝajne ne ĉiuj validas kaj eble mankas al ni kelkaj, ni ankaŭ ĉi tie petas alskribaĵon de la interesuloj. La Spirit-sciencia Instituto de Martinus, Esperanto-sekcio, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danujo.



MAJSTROVERKO DE LA MONDLITERATURO

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., afranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe
U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LA MEZAMERIKA BIERFABRIKO (CERVECERIA CENTROAMERICANA S.A.)

en Gvatemalo, fabrikas bieron, kiun ĉi tie
oni konsideras unu el la plej bongustaj.

Ĝia nomo estas

BIERO MONTECARLO

Ni deziras, ke personoj el diversaj landoj
provu ĝin, kaj bonvole donu sian opinion pri
ĝia kvalito. Tiucele ni volonte DONACOS po
du botelojn al la unuaj dudek petantoj el ĉiu
lando.

Bonvolu, do, peti viajn du botelojn de la
Biero MONTECARLO. Nur ni petas vin poste
alsendi vian ŝatatan opinion.

Skribu el ĉiuj landoj al

**CERVECERIA CENTROAMERICANA S.A.
EL ZAPOTE, GUATEMALA**